

HORIZONTO

III-a JARO N-o 17 (5)
SEPTEMBRO - OKTOBRO 1978

LTURA KAJ INFORMA REVUO



TRANSPONTI LA BARAĴOJN

LA JOTA KAJ NIA ARAGONA SENTO

POSTKONFERENCAJ KONSIDEROJ

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76
N.º 5 - Septembro - Oktobro 1978

ENHAVO

TRANSPORTI LA BARAJOJN (Juan Régulo)

MIA KOMENTO (Inés Gastón)

4a INTERNACIA KONFERENCO DE NEM. Raportas (S. Gumá kaj D. Luez)

DECIDOJ kaj REZOLUCIO (La Prezidentaro)

ELEMENTA KURSO DE ESPERANTO. Raportas (Daniel Luez)

LA JOTA KAJ NIA ARAGONA SENTO (M. Sancho Izquierdo)

IVO LAPENNA. Iom pri lia vivo kaj agado en Jugoslavio (Oton Pancer)

POSTKONFERENCAJ KONSIDEROJ (Salvador Gumá)

KION VI NE LEGOS ALILOKE. Publika letero de D-ro Salan al D-ro Tonkin

LA POLITIKA KAJ LINGVA MAPO DE EUROPO. Prelego (Ivo Lapenna)

El la dana agad-grupo «PERSPEKTIVO» (J. T.)

TRA LA ESPERANTA GAZETARO. Raportas (Jean Thierry)

LA KAPROMPA ANGULO

POSTKONFERENCA EKSKURSO. Raportas (P. O.)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón. Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk. Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,— D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono: 38,— F. Mk.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5, D-3000 HANNOVER 1. Pĉk. Hannover 120 854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omonia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 445854-8. Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10, YU-41000 ZAGREB.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO, Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:
Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L. OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Epargne de l'Etat). Jarabono: 380, luksemburgaj frankoj.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

TRANSPONTI LA BARAĴOJN

Pripensoj post Rejkjaviko kaj Ĥako

La Universala Kongreso de Hamburgo (1974) naskis movadan disduiĝon, kiu jam kvar jarojn norie mueladas, sen konduki al iu loko. El tiu enua noriado ne povas eliri alia akvo, ol la ĉiama. Nia propra historio, politika regemo, mondaj influzonoj certe agas sur la gvidliniojn de nia afero. Sed ĉu dependas nur de tiuj faktoroj la estonta vojo de nia movado? Ne tiel gravas la personoj; gravas la humana, homarana konsistigo de Esperantujo. Post kiam mi estis en Rejkjaviko en 1977 kaj en Ĥako (Jaca) en 1978; post kiam mi konstatis la dilemon inter tiuj, kiuj respondecas pri helpo kaj subteno al esperantistoj de ĉiuj latitudoj (geografiaj kaj ideologiaj), venis en mian kapon kelkaj prikonsideroj, kiujn mi kuraĝas eksterigi.

Certe Esperantujon ne konsistigas plene demokrata socio; sed malpleje ĝin estras absoluta monarĥio (persona aŭ partia). La mondaj cirkonstancoj estas ja gravaj. Sed ili ne rajtigas nin dramigi, pli ol necese, la posthamburgajn eventojn de Esperantujo. La historio de nia movado instruas nin pri navigado sur profundaj maroj kaj pri brusurdivagaj ŝtormoj, same dum la Ido-skismo kiel dum la laborista disduiĝo inter SAT kaj IPE; same dum la grandaj hitleraj kaj stalina silentigoj kiel dum la metoda japana policopersekutado; ktp. Kaj, malgraŭe, nia ŝipo ne subakviĝis.

Min plenigas per espero la honesteco, kiun mi konstatis ĉe pluraj signifuloj, same en Rejkjaviko kiel en Ĥako. Min aparte impresis la purigadopedo, kiun Lapenna prezentas en la dua eldono de sia unike bona *Hamburgo en Retrospektivo* — mejloŝtona verko en nia Movado — kaj kiun defendas multnombraj ĉefrolantoj en la Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM): Ili celas nur la aŭtentikecon, kiun praktikis Zamenhof kaj kiun Lapenna science analizis kiel *humanecan internaciismon*. Sed aliflanke kiam ĉie en la mondo oni klopodas morale kaj azile apogi kaj solidare subteni, cis- kaj transferkurtene, liberamajn disidentojn, Esperantujo ne povas senplie forlasi al sia sorto niajn liberamajn samideanojn en landoj, kie oficialuloj devas ja havi en siaj poŝoj partimembrokartojn aŭ aliajn fidelecatetilojn por povi estrarpostene deĵori. Ne demandu min, kie estas la ĝusta limo inter unu kaj alia komprenmanieroj. Tial la dilemo, kiun mi palpis, same en Rejkjaviko kiel en Ĥako. Mi scias, ke la neŭtralecomuregoj, kiuj nin ŝirmis ĝis Hamburgo, fendigis; sed mi same povas aserti, ke, dank, al tiu disfendiĝo, nun forte ekĝermas novaj semoj, ĝuste sur la ruinoj de tiu disrompiĝo.

Ni devas orienti nian agadon ĉirkaŭ la hodiaŭa senco de la preskaŭsinonimoj *samideanismo*, *esperantismo*, *homaranismo*, *interna ideo-ismo*, *humaneca internaciismo*. *Samideano* estas mirinda vorto. Same kiel la latina *communis*. Sed antaŭ ol ilin analizi, ni faru ekskurseton en la kampon de la lingvoscienco. Nu, komence de la nuna jarcento, fama svisa lingvisto, Ferdinando de Soso (Saussure), forĝis la terminon *sintagmo* por difini la signifon rezultantan el la kuniĝo de du aŭ pliaj semantemoj, kiun signifon ĝenerale ne konsistigas la opa sumo de ĉiuj semantemoj, sed io nova. En latino *communis* estas kunmetaĵo el *cum* 'kun' kaj *munis*. La signifo de *com-munis* estas la kontraŭo de *im-munis* 'imuna': do *com-munis* temas rekte pri tiuj, kiuj kunportas komunan respondecon; pri tiuj, kiuj sindevontige partoprenas komunan mision. Oni ne atingas *komunion*, t.e. 'komunumon', per nura membrokuniĝo. Ĉiu devas partopreni la komunan laboron, ĉiu devas respondece kunhelpi la komunan entreprenon. Ĉio ĉi tio apenaŭ havas similecon kun politika demokratio formala aŭ kun la principo de popola suvereneco.

La sintagmo *samideano* transcendis la semantemojn *sam ide an o* kaj ĝi nun signifas 'homo, kiu respondece partoprenas la komunan entreprenon de la esperantismo, t.e. la penadon disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa'. Tiel *samideano* kaj *komunumano* formiĝis laŭ historie paralelaj ŝablonoj kaj estas nocie tre proksimaj. Dume *samideanismo* kaj *esperantismo* preskaŭ sinonimiĝis. Ĉar *esperantismo* (alia sintagmo transcendentia siajn konsistigajn erojn: *esper ant ism o*) estas io pli ol simpla membrokolektado en asociojn laŭ vertikala vojo de ekstera disciplino. La esperantismo kunportas ideologion, la t.n. *internan ideon* aŭ *homaranismon* (Zamenhof), kiun Lapenna kaj aliaj aktualigis sub la nova sintagmo *humaneca internaciismo*, t.e. celado al pura homeco, al absoluta intergenta justeco kaj egaleco per lingvo neŭtrale homa.

En tiu kunteksto, UEA, SAT, NEM ktp estas nur «ikonoj» de la interna ideo, aŭ esperantismo, aŭ homaranismo, aŭ humaneca internaciismo. La multeco de popoloj, kulturoj, situacioj kaj personaj alvokiĝoj, kiuj hodiaŭ intencas respondece partopreni la in-

ternan ideon, la humanecan internaciismon, la samideanismon, alportas al la movado novan konscion pri universaleco. Ni devas dialogigi la kulturojn. Esti humaneca internaciisto estas io pli ol nura lernigo de la lingvo al homoj de ĉiuj geografioj. Ne ekzistas ekskluziva modelo por la disvastigo de la esperantismo. Ni devas nin firme gardi kontraŭ ĉiaj ekskluzivismoj.

Ni bezonas homojn kun pura koro, oferemajn, liberajn, energiajn, por plenumi la necesan klarigon kaj purigon, kiujn nia nuna movado kaj ĝia neŭtrala funkciado nostalgas. Multajn tiajn homojn mi trovis en Rejkjaviko kaj en Ĥako. La historio pruvis, ke kiam komunistoj en SAT, naziistoj en Germanujo, makartistoj en Usono ktp pretendis, ke la esperantistoj perdu sian liberecon, ili sukcesis atingi ĝuste la malon. Tial kun pura koro mi subskribis la Rezolucion de Ĥako adresitan al la komitatanoj de UEA. Mi estas konvinkita, ke se estigos honesta, eĉ se nur perletera, dialogo, la baroj povas esti transpontitaj sen perdo de ies vizaĝo. Ĉiuj sinceraj esperantistoj bedaŭras la disdubiĝon kaj sopiras rekuniĝon. El same pura koro mi povas diri, ke por mi —kaj probable por multaj aliaj— ne ĉefe gravas, ĉu komunistoj aŭ nekomunistoj sidas en niaj (pasemaj) estraroj: pleje gravas, ke la movadanoj estu *aŭtentikaj* —t.e. liberaj, oferemaj, energiaj— *esperantistoj*.

Juan Régulo

MIA KOMENTO

Pasis la IV.^a Konferenco de NEM; ne estas mi la persono adekvata por ĝin juĝi; la pli ol tridek horoj da registritaj sonbendoj estas bona atestilo pri la realigita laboro. Sed mi deziras iom komenti pri la amika renkontiĝo omaĝe al Prof. d-ro Ivo Lapenna, okazinta en la kadro de la Konferenco.

Aŭskultante al d-ro Oton Pancer, mi multe pensis kaj pensas, kiom multe la esperantistoj ŝuldas al nia eminenta samideano. Ne ofte sindone sin dediĉas al Esperanto, personoj kiaj d-ro Ivo Lapenna. Estas superfluaĵ ĉiuj epitetoj, kiam la elstareco de la persono parolas per si mem, kaj tiu de profesoro Lapenna igas nenecesa la priskribon de liaj meritoj. Mi bone memoras nian ĝojon, kiam en la jaro 1964, la estraro de HEF, kies sekretariino mi estis, ricevis la informon pri lia elekto kiel Prezidanto de UEA, same kiel mi memoras la vortojn per kiuj la tiama redaktoro de nia organo «Boletín», Nicolás L. Escartín, informis la hispanajn esperantistojn:

«La elekto de Prof. D-ro Ivo Lapenna kiel Prezidanto de UEA estas granda ĝojo por la tutmonda esperantistaro. Liaj kapabloj kiel unuaranga verkisto, prelegisto kaj aktivulo de nia movado estas ĉie konataj, kaj liaj scioj pri la lingvoproblemoj en internaciaj rilatoj krom lia renomo en internacia juro, certigas al la esperantistaro plej kompetentan gvidadon en la finan celon.

Kun kora gratulo al UEA pro la trafa elekto de D-ro Lapenna por la plej alta posteno de nia movado, la hispanaj esperantistoj, konsciaj pri la samideanaj devoj kaj respondecoj plenfide kaj helpeme diras al li: Kara Prezidanto, JE VIA DISPONO!»

La jaroj pasis. Kvindek jaroj da konstanta laboro favore al Esperanto, nura racia solvo por la lingvoproblemo, alte parolas pri lia humaneca internaciismo. Li per sia prestiĝa laboro, krom pluraj gravaj atingajoj de ĉiuj konataj, sukcesis krei rilate al Esperanto, etoson de respekto kaj simpatio ne facile atingebla. Pro tio, kiam ni konsciis pri la Ora Jubileo de lia esperantisteco, estis granda ĝojo kaj honoro por la organizantoj de la IV.^a Konferenco de NEM, ke tiu amika omaĝo al Prof. Lapenna okazu en Jaca. Laŭ mia opinio tiu amika renkontiĝo estis la plej kortuŝa kaj brila ero de nia programo.

Kiel organizinto de la Konferenco, mi kore dankas al ĉiuj partoprenintoj, kaj por tiuj amikoj kiuj ne partoprenis ĝin, mian indulgon.

Inés Gastón

LA 4-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Sub la aŭspicio de la Universitato de Zaragoza kaj honora prezidanteco de Lia Eksce-
lenco S-ro Pio Cabanillas Gallas, ministro pri kulturo

Jaca - Hispanujo 22-an / 29-an de julio 1978

«Komenco bona, laboro duona» diras proverbo, kaj tiel fakte okazis. Aligis pli ol cent tridek konferencanoj partoprenis 102. En la granda, moderna kaj luksa «Palaco de Kongresoj kaj Ekspozicioj» ni vivis en kaj por Esperanto unu tutan semajnon. La kongresprogramo plenumiĝis akurate de la unua momento ĝis la lasta.

La 22-an de julio. Ricevinte la konferencdokumentojn, ni povis eniri la ĉambron, kie je la 10-a s-ro Daniel Luez per klara voĉo komencis la unuan lecionon de sia rektmetoda kurso de Esperanto (Vidu pli poste lian raporton).

Posttagmeze okazis la unua laborkunsido prezidata de s-ro S. Gumá. La ĉefa temo estis la «Regularo de Internaciaj Konferencoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado» prezentita de prof. Ivo Lapenna, kiu legis la unuopajn regulojn por tuja pritrakto kaj eventuala aprobo. Estis konsiderinda la ĝenerala interesiĝo pri la temo, kaj post longa debato kun multaj intervenoj oni aprobis ĝin, konsiderinte la sugeston de mag. I. Dratwer, ke la Lokaj Organizaj Komitatoj penu okazigi la Konferencojn je dato ebliganta la partoprenon ankaŭ en kongresoj de UEA.

Vespere okazis la agrabla renkontiĝo aŭ konatiĝo de amikoj, kaj jen, neatendite, aperis studenta muziktrupeto (*tuna*) kun siaj gajigaj kantoj. Junaj studentoj radiantaj simpatie en nigraj manteloj surkovritaj per koloraj rubandoj... Per la fingroj ili pinĉas la kordojn, sed la tamburinojn ili frapas eĉ per kubutoj. Raj piedoj! En bonhumora Esperanto ili kantis:

*Mi komencis en knabec'
inĝenieran karieron;
tia estis la studem',
ke mi ĝislernis elementojn.*

*En trinkejoj dum maten',
posttagmeze en kazinoj,
fine jam en la vesper'
studis kun filozofinoj...*

Estis tre varme kaj ŝvebis la gajeco. Baldaŭ la ĉeestantaro manon en mano faris pro nesufiĉa salonamplekso du samcentrajn rondojn, kiuj onde kaj move kliniĝadis laŭ la takto de l'muzikiloj. Sonis la 24-a horo!

La 23-an de julio. En la ĉefa salono de la Urbodomo okazis la Solena Malfermo de la Konferenco. Prezidis Lia Moŝto s-ro Armando Abadia, urbestro de Jaca, kiu per ne-longa parolado esprimis al ni sian tutan simpatieon por Esperanto, tiu granda rimedo — li diris — kiu, simile al muziko, ebligas al homa spirito diskonigi sin. Li esperis, ke ni revenos al Jaca, urbo de paco, amikeco kaj amo. (Longa aplaŭdado). Prof. Juan Régulo tradukis por la konferencanoj.

Sekvis Lia Moŝto Miguel Sancho Izquierdo, kiu en la hispana dankis la Urbestron pro la ricevita helpo, salutis la Delegiton de la Kulturministro kaj dankis ankaŭ la Re-prezentanton de la Universitato de Zaragoza. Ripetinte en Esperanto tiujn vortojn, li salutis la konferencanojn, kaj finis per tre emociaj vortoj, kiujn oni vigle aplaŭdis.

Fino Inés Gastón proponis kiel Prezidanton de la Konferenco prof. Miguel Sancho Izquierdo; kiel Vicprezidantojn, mag. I. Dratwer, prof. O. Pancer kaj Juan Régulo, s-rojn H. V. Rasmussen kaj Jean Thierry; kiel protokolantojn s-roj Salvador Gumá kaj Daniel Luez. (Unuanima aprobo).

Tuj poste prof. Ivo Lapenna faris la inaŭguran paroladon, kies temo estis «Neŭtraleco kaj Humaneco». Li aludis la lingvan diversecon en Eŭropo, la socian realaĵon de la nacioj, la humanisman aspekton de Esperanto, kaj esprimis la esperon, ke nia Konferenco signu pluan progreson en la vivo de la Zamenhofa Esperantismo. (Ĝi aperos en venonta numero de «HORIZONTO»).

Prof. Juan Régulo tradukis por la aŭtoritatuloj; kaj respondis Lia Moŝto Manuel Borrrel Núñez en la nomo de Lia Ministra Moŝto s-ro Pio Cabanillas Gallas. El liaj vortoj mi reliefigas: «Mi estas kontenta povi dividi kun vi vian taskon... Ciutage la nacioj estas pli enfermitaj... Esperanto estas Kulturo, nova vivoformo». Post tiuj vortoj li deklaris en la nomo de Lia Ministra Moŝto s-ro Pio Cabanillas tiun ĉi konferencon inaŭgurita.

Posttagmeze prezidis prof. Juan Régulo kaj prelegis prof. Ivo Lapenna pri la temo «Eŭropo hodiaŭ - kulturaj kaj politikaj aspektoj». Ĉar sekve de pli posta decido la prelegoj laŭeble aperos en «HORIZONTO», mi raportas nur, ke la interesiĝo estis tiel granda, ke la ŝvitiga varmego nenium konferencanon forpelis.

Post la traktajo de prof. I. Lapenna, kiun oni longe aplaŭdis, sekvis vigla debato, kiun partoprenis mag. I. Dratwer, prof. O. Pancer kaj s-ro S. Gumá. La preleginto respondis al la demandoj aŭ sugestoj formulitaj. Sekvis dekkvinminuta paŭzo; kaj, ĉar prof. Paul Neergaard ne povis alesti por sia prelego, ĉi tiun laŭtleĝis s-ro Jean Thierry. La temo estis «Eŭropo kaj la Tria Mondo». En la debato intervenis s-ro Dratwer, prof. I. Lapenna kaj Juan Régulo, s-roj Jean Thierry kaj S. Gumá. Interalie estis rimarkite, ke la prelego konsideris la rilatojn de la Tria Mondo nur kun la Okcidenta Eŭropo; mankis tiuj ne malpli interesaj kun la Orienta Eŭropo!

Post momento okazis la koncerto de la ĉambrorkestro «Ciudad de Zaragoza», bela regalo de la Sparkaso de Zaragoza, Aragon kaj Rioja. Ni ĝuis delikatan muzikon ravan kaj ripozigan. La kvaliton de tiu Orkestro atestas la kvar gravaj premioj ricevita en la daŭro de kvin jaroj (1969-1974).

La 24-an de julio. Prezidas s-ro H. V. Rasmussen kaj prelegas prof. Juan Régulo pri la temo: «Kontribuo de Hispanujo al la Eŭropa Kulturo». Sekvis debato kun intervenoj de prof. I. Lapenna kaj s-ro S. Gumá.

Post paŭzo prelegas prof. O. Pancer pri «Agrikulturo kaj hortikulturo en Eŭropo». Partoprenis la debaton mag. I. Dratwer, s-roj S. Gumá kaj Günther Becker.

Sekvis la prelego de s-ro Jean Thierry: «Ĉefverkoj de la Eŭropa Literaturo en la Internacia Lingvo». En la diskutado intervenis mag. I. Dratwer, prof. J. Régulo, I. Lapenna kaj O. Pancer, kaj s-roj S. Gumá, D. Luez, Hernández Izal kaj Benito, s-ro A. Dratwer.

Posttagmeze prezidis s-ro H. V. Rasmussen kaj prelegis prof. Ivo Lapenna pri «La Koncepto de Neŭtraleco en la Internaciaj Rilatoj», kiu prelego aperos en la «INTERNACIA JURA REVUO».

Post paŭzo prelegis s-ro Jean Thierry pri «La principo de Neŭtraleco en la Esperanto-Movado (Historia Trarigardo kaj Nuna Stato)». En la debato intervenis precipe d-ro G. Salan kaj prof. I. Lapenna.

Tuj poste okazis filmprezentado de la Monda Folkloro Festivalo de la Pireneo, 1977, kaj de la Monda Konkurso pri Profesia Arta Glitado, 1977, ambaŭ okazintaj en Jaca.

La 25-an de julio. Prezidis mag. I. Dratwer la debaton pri «Neŭtraleco kaj Neŭtralismo». Intervenis finoj M. Vermaas, L. Thune, I. Gastón, prof. I. Lapenna, J. Régulo, O. Pancer, d-ro G. Salan, mag. I. Dratwer, s-roj Otaola, J. Thierry, S. Gumá, V. Ortiz, Benito kaj Sakellaropoulos. Vigla debato, dum kiu evidentiĝis ies malneŭtralaj manovroj, eĉ komplotoj.



Okazis posttagmeze la amika omaĝo al prof. d-ro Ivo Lapenna pro lia 50-jara esperantisteco. Intima, interamika kunsido. S-ro J. Thierry per emociaj vortoj donis al li atestaĵon pri la sento de sinceraj amikoj. F-ino Inés Gastón en la nomo de prof. Paul Neergaard donacis al li botelon da hispana vino. Prof. O. Pancer prezentis partan biografion de prof. I. Lapenna. (Vidu ĉin pli poste). Mag. I. Dratwer rakontis pri sia interkonatiĝo kun prof. I. Lapenna kaj deziris al li cent jarojn da vivo, sed laŭ la juda kutimo kun 12 %, t.e. 112 jarojn. S-ro P. Schilperoord alportis saluton de la Londona Klubo. F-ino Inés Gastón transdonis amason da leteroj kaj laŭtlegis telegramojn de s-ino Carolina Minnaja, de s-roj Juan Figueras kaj Juan Bruno, kaj de la Hispana Esperanto-Federacio. S-ino Sakellaropoulos donis al li grekan vazon kaj s-ro Günther Becker libreton: kaj li laŭtlegis dediĉitan poemeton. Prof. I. Lapenna malfermis skatoleton kaj surprize trovis oran brakhorloĝon. Per afablaj vortoj li esprimis sian koran dankon, esperante

vivi longe por la bono de Esperanto. Unu frazon mi elektis: «*Se oni restus fidela al siaj idealoj de la juneco, la mondo aspektus alie!*» Intervenis ankaŭ prof. O. Pancer, mag. I. Dratwer kaj s-roj G. Bécker, P. Zacho kaj Zaragoza. Sekvis anekdotoj kaj amuzaj rakontoj el la vivo de prof. I. Lapenna; kaj ĝoje ni iris al la bankedo.



Jam altablighinte, ni ekaŭdis la voĉon de Don Miguel — tiel ni nomas profesoron Miguel Sancho Izquierdo... Sed jen aperis gejunula trupo, kiu regalis nin per prezentado de la tipa danco de Aragono. Miriga kaj admirinda! Koloroj, rapideco, svingiĝo, energio, vigla kaj ritma klakado de kastanjetoj, potence profunda voĉo de l'kantisto, kiu en Esperanto dediĉis unu strofon al ni kaj alian al prof. I. Lapenna. Longa aplaŭdado. Vivu la Hoto kaj ĝia popolo!

La 26-an de julio. Prezidis s-ro Jean Thierry la debaton pri «Organizaj Demandoj». Li laŭtlegis leteron de prof. Frank pri la Eŭropa Klubo. Intervenis mag. I. Dratwer, s-roj Günther Becker, S. Gumá, J. Thierry, prof. I. Lapenna, f-inoj M. Vermaas, L. Thune, Inés Gastón, s-ino Dratwer. Evidentiĝis, ke la Interlingvistiko, la Lingvoplanado kaj la subŝovataj teorioj kontraŭ la principoj de nia Akademio malkongruas kun la vivanta Esperanto kaj malfavoras ĝin; ke, kvankam en multaj landoj la nomo Esperanto estas sinonima je internacia lingvo, ni ne devas honti uzi la nomon Esperanto por klare difini la funkciantan Lingvon Internacian.

Post paŭzo prof. I. Lapenna laŭtlegas proponatan decidon pri la Eŭropa Klubo, kaj oni aprobas ĝin. (Vidu pli poste la decidon).

Pri la rolo de «HORIZONTO» informis f-ino Inés Gastón. Intervenis mag. I. Dratwer, prof. J. Régulo kaj I. Lapenna, f-ino M. Vermaas, s-roj S. Gumá kaj P. Zacho, kaj s-ino Dratwer. Oni ĝenerale konsentas, ke, ĉar «HORIZONTO» estas absolute necesa al NEM, ni devas nepre vivi kaj fortikigi ĝin; ke ĝi ne fariĝu eksperimentejo de lingvaj novigoj, sed tamen toleru en la verkoj de renomaj esperantistoj ian novigeblecon; ke en «HORIZONTO» aperu nenio kontraŭa al Akademiaj decidoj. La konsisto, la formo, la enhavo kaj la aspekto de «HORIZONTO» meritas ĉies aprobon. Tion konfirmas la varmaj aplaŭdoj al f-ino Inés Gastón pro ŝia celtrafa direktado.

Posttagmeze okazas la ekskurso al San Juan de la Peña je 37 km. de Jaca, fama monaĥejo, panteono de l'Aragonaj reĝoj, situanta en pitoreska loko, kaj konstruita en grandega roko. Por ŝatantoj de Arto kaj Historio tie kuŝas dikega tavolo da konindaj faktoj.

La 27-an de julio. S-ro J. Thierry laŭtlegas raporton de s-ro A. Bourdeaux pri Informado kaj UEA kun rezolucia propono. Sekvas debato, en kiu intervenas prof. J. Régulo, I. Lapenna, O. Pancer, f-ino M. Vermaas kaj Lis Thune, mag. Dratwer kaj s-ro Sakellariopoulos. El tiu longa debato rezultis premisoj por la aprobota rezolucio.

Post paŭzo sekvas debato pri la financo de «HORIZONTO». Intervenias prof. I. Lapenna, f-ino M. Vermaas, s-roj P. Zacho kaj G. Bécker. Oni konsentas pri la bezono trovi

pliajn perantojn. Ili povus faciligi la varbadon de novaj abonantoj; por tuja solvo oni faru monkoklekton, kaj por konstanta helpo oni sendadu poŝtmarkojn al s-ro P. Zacho. Abonojn oni pagu ankaŭ donace al geamikoj. La kotizon oni ne altigu sed la antaŭan kurzon oni apliku favore al «HORIZONTO».


Poste ni iris viziti la Someran Universitaton de Jaca, kie en la nomo de la Rektoro de la Universitato de Zaragoza akceptis nin s-ro Serafin Agud, Direktoro de la Internaciaj Kursoj. Li esprimis per amikaj vortoj sian simpatian al nia afero. Prof. J. Régulo tradukis liajn vortojn en Esperanton. Al s-ro Serafin Agud danke respondis prof. I. Lapenna, esperante, ke iam en tiu ĉi Universitato oni instruos ankaŭ Esperanton. Longaj tabloj kun abundaj manĝetoj kaj fridaj trinkaĵoj atendis nin. Tutkore dankon pro la neatendita regalo!

Posttagmeze prezidas s-ro J. Thierry. Li sciigas, ke tuj post la ĉi-matena alvoko juna knabo jam pardonacis cent pesetojn al «HORIZONTO»: imitinda ekzemplo! Sekvas debato kun iel konkreta karaktero pri diversaj punktoj: la Regularo de NEM, la Eŭropa Klubo, la enhavo kaj financo de «HORIZONTO», kaj la LIBRO-SERVO de NEM plenumota de la agadgrupo «Perspektivo» (S-ro P. Zacho faros librokatalogon).

S-ro Sakellariopoulos invitas la 5-an Konferencon de NEM al Ateno. Pri la ĉefa temo de la Konferenco intervenas s-roj Sakellariopoulos kaj G. Becker, prof. J. Régulo kaj I. Lapenna. El la debato evidentiĝas, ke ankoraŭ ne venis la momento trakti la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Mag. I. Dratwer pledas por ĝusta prononcado kaj lingva fundamenteco. F-ino L. Thune proponas, ke plu okazu la Esperanta kurso de s-ro D. Luez dum la estontaj konferencoj.

S-ro J. Thierry prezentas la Konferencan Rezolucion, kaj unuanime oni aprobas ĝin. F-ino Inés Gastón estas preta sendi ĝin al ĉiu Komitatano de UEA kaj deziras, ke la nunaj vicprezidantoj, s-roj H. V. Rasmussen kaj J. Thierry estu la oficialaj reprezentantoj de NEM ĝis la proksima Konferenco. (Generala aprobo). S-ino A. Dratwer esprimas sian tutkore dankon al f-inoj Inés kaj Emilia Gastón pro ilia senmezura sindonado.

Fine ni iras viziti la «Palacon de l'Glacio», vastan glitejon, kie ni vidas la du junajn ĉampioninojn de Hispanujo kaj de la Mondo. Aliaj paroj (versajne ne pli ol ses-jaraj) jam tre lerte moviĝadas sur la glitiloj...



La 28-an de julio. Okazis la tuttaga ekskurso al la Nacia Parko de Ordesa. Bonŝance estis tre bela vetero por tiu necesa programero. Unu tago por interparoli kun alilandaj amikoj, ĉu estas sufiĉe?

La 29-an de julio. Prezidas prof. Miguel Sancho Izquierdo kaj gvidas la diskutadon prof. O. Pancer. S-ro Daniel Luez raportas pri sia kurso. (Vidu pli poste lian raporton).

Prof. O. Pancer prezentas la rezulton de statistika esploro inter studentoj de Zagreb pri Esperanto, kaj li verkos raporteton por «HORIZONTO». Intervenis prof. I. Lapenna, mag. I. Dratwer kaj f-ino Inés Gastón. Resume la ĉefaj priparolitaj temoj estis: la kurso de s-ro Daniel Luez, la statistika esplorado de studentoj pri tio, kion oni scias pri Esperanto, la programo de la Universala Kongreso en Varna, la monkoklekto kaj la libroservo.

Post paŭzo gvidas la debaton prof. Régulo.

S-ro J. Thierry laŭtlegas kartojn kaj leterojn de nevenintoj: de s-roj James Fairbank, Mogen Groth kaj Rikardo Sulco; de Radio Vatikana kun gratuloj por «HORIZONTO»; de Eŭropa Klubo kun gratuloj por «HORIZONTO», kuraĝigo al NEM kaj saluto al prof. Ivo Lapenna okaze de lia jubileo.

Poste s-ro J. Thierry laŭtlegas la Decidojn kaj la Rezolucion de la Konferenco (Vidu pli poste). Intervenis s-ro H. V. Rasmussen, kiu faris bukedon el la cirkonstancoj sukcesigintaj nian Konferencon: la bela situo de Jaca, ĝia ĉarmo, la inaŭguro en la Urbodomo, la ĉeesto de la Urbestro kaj de la Reprezentanto de la Kulturministro, la graveco de la prelegoj, la perfekta aranĝo, la unikeco de la «Palaco de Kongresoj» kaj pli speciale la Direktoro, oficistoj kaj teknikistoj de la Palaco, kiuj post la kuliso anonime, kvazaŭ ne ekzistante, malgraŭ la varmo faris, ke ni aŭdu unu la alian kiel en normala interparolo. En la nomo de la Konferencanoj li esprimis dankon al f-inoj Inés kaj Emilia Gastón, al tiuj homoj postkulisaj, kaj al ĉiu kiu iel helpis la tutan aranĝon. Prof. Régulo tradukis en la hispanan, kaj eksonis vigla aplaŭdado.

Tiam prof. I. Lapenna sciigis, ke la monkollekto havigis kvardek sesmil pesetojn por «HORIZONTO»; kaj li donacis bukedojn al f-inoj Inés kaj Emilia Gastón pro la trafa direktado de «HORIZONTO» kaj la perfekta aranĝado de la 4-a Konferenco de NEM. F-ino Emilia Gastón transdonis sian bukedon al la filino de prof. Miguel Sancho Izquierdo memore al ŝia patrino.

Fine parolis prof. Ivo Lapenna. Li esprimis sian nunan optimismon. Nia celo estas la partipolitika neŭtraleco de Esperanto kaj UEA. Nun ĝi (UEA) ne estas tia. Ankoraŭ okazas sekretaj kunsidoj. Dume ni diskonigu kaj vivtenu «HORIZONTO-n»; ni trovu perantojn kaj abonantojn. Ni klopodu abonigi homojn en nepagipovaj landoj. Ni diskonigu la 5-an Konferencon de NEM en Greklando!

Kaj la prezidanto, prof. Miguel Sancho Izquierdo, deklaris fermita la 4-an Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La protokolintoj: s-roj Salvador Gumá kaj Daniel Luez.

17/8/1978



KONFERENCANOJ

Kompletigo de la adresaro laŭnumera

123. Waringhien, Prof. Gaston, 182, Av. Rouget-de-Lisle, 94 - Vitry-s/-Seine, F.
124. Benito Cedo, Jaime, Isaac Peral, 1, Zaragoza-1, E.
125. Laquidain, Pilarcho, Paz, 6, Zaragoza-8, E.
126. Andolz, M.^a Victoria, Almagro, 8, Zaragoza-4, E.
127. Bun, Avelino, Antonio Maura, 8, Zaragoza-13, E.
128. Franquesa, José, P.^o de Ronda, 90, Lérida, E.
129. Medalón, Gregorio, San Antonio M.^o Claret, 5, Zaragoza-5, E.
130. Navarro, Enrique, Apartado (P.K.) n.^o 5, Barbastro (Huesca), E.
131. Castán, Santiago, Ed. Luchón, 2.^o A, Benasque (Huesca), E.

4-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Decido

La 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Jaca de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1978, ekzameninte en kvin prelegoj kaj diskutoj la ĉeftemon *Eŭropo Hodiaŭ - Kulturaj kaj Politikaj Aspektoj*, konsiderante ankaŭ la proponojn prezentitajn de la Eŭropa Klubo,

konstatas, ke la lingva problemo en Eŭropo postulas urĝan solvon, kaj ke la ĝeneraligo de la neŭtrale homa Internacia Lingvo (Esperanto) prezentigas kiel la sola justa kaj celtaŭga solvo,

decidas doni sian apogon al la Eŭropa Klubo kun la sidejo en Paderborn, kondiĉe ke ĝi komencu realigadi la ideojn entenatajn en la Perspektiva Agadprogramo de la Eŭropa Klubo, ellaborita laŭ la decidoj de la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj publikigita en la revuo HORIZONTO, n-ro 6/1977, p-oj 122-127. La sekvonta Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado ekzamenos la progreson en la realigado de la Perspektiva Agadprogramo kaj rezulte decidus pri la eventualaj pluaj paŝoj.

La Prezidentaro

4-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Decidoj

1. La Konferenca Regularo estis akceptita tia, kia ĝi estis proponita en HORIZONTO (4/78).
2. Kun unu sindeteno estis decidite subteni la Eŭropan Klubon kondiĉe, ke ĝi realigu la agadprogramon publikigitan en HORIZONTO.
3. La ĝenerala linio de HORIZONTO estis unuanime aprobita.
4. Pri la financa stato de HORIZONTO propono pri altigo de la abonkotizoj estis malakceptita, sed la perantoj bonvolos pagi laŭ la valoro de la antaŭa kurso publikigita en HORIZONTO profite al ĝi.
5. La Konferenco deklaras, ke la libroservo PERSPEKTIVO en Kopenhago estas la sola oficiala libroservo de la Neŭtrala Esperanto-Movado.
6. La 5-a Konferenco okazos en Ateno en la Universitata Domo en la semajno komenciĝanta la 11-an de aŭgusto 1979 kun la ĉeftemo «Instruado de la Internacia Lingvo Esperanto (lerneja kaj eksterleneja) kun aparta konsidero al la situacio en Eŭropo».
7. S-roj H. V. Rasmussen kaj Jean Thierry estis komisiitaj reprezenti la Neŭtralan Esperanto-Movadon konforme al la Regularo ĝis la venonta Konferenco.

La Prezidentaro

4-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Rezolucio

La 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Jaca (Hispanio) de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1978,

— aŭdinte la prelegojn de prof. Ivo Lapenna kaj s-ro Jean Thierry pri la ĉeftemo «Neŭtraleco kaj neŭtralismo» kaj la referaĵon de d-ro G. Salan, kiu ĉeestas la Konferencon kiel sendependa observanto, kiel ankaŭ la raporton de s-ro A. Bourdeaux pri informado,

— post ĉiuflanka debato unuanime decidis:

- 1) publikigi la ĉefajn kontribuojn en la revuo HORIZONTO aŭ en aliaj partipolitike neŭtralaj Esperanto-publikaĵoj;
- 2) rekonfirmi la Deklaron de Principoj, akceptitan de la 1-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, en la formo redaktita en la Regularo de la Internaciaj Konferencoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado,
- 3) komuniki al ĉiuj Komitatanoj de UEA kaj publikigi en la revuo HORIZONTO la suban tekston, akceptitan de la Konferenca Pleno la 27-an de julio per ĉiuj voĉoj krom 3 sindetenoj:

«La partoprenintoj en la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado,

— konstatinte — en kia situacio troviĝas nun Universala Esperanto-Asocio fondita de Hector Hodler en 1908;

- ke ĝia antaŭa dinamikeco defalis ĝis ia aktivismo sen kultura enhavo,
- ke tion kaŭzis unuflanke la elekto de Estraro, kiu neglektis la antaŭe akceptitan 3-an laborprogramon kaj la laborplanon por la «Kontraŭrasma Jardeko» kaj daŭre prezentigas jam de 1974 sen antaŭe planita laborprogramo; kaj aliflanke la forlaso de la idealo, kiu de la origino ĝis tiam naskis kaj progresigis la Esperanto-parolantan komunajn, nome tiu de «humaneca internaciismo», nun senĉese kritikata en la gazetoj de la t.n. «socialismaj landoj»;

konsciante pri la danĝeraj nuntempaj sintenoj de unuj, kiuj observas ian «singardan atendismon», kaj de aliaj, kiuj almenaŭ ŝajne aplikas ian «neŭtralismon» por plej facile maski sian unuflankan komplezon al difinita politika bloko kaj ignorigi al la membraro la politikajn faktorojn ekster UEA, kiuj fakte influas la tutan agadon de la Asocio kaj klare reflektigas en ĝia Komitato;

deziras starigi jenajn demandojn:

- 1) Ĉu vi ne sentas en la nuna Estraro la mankon de pozitiva kaj valora, reale efektivigata, laborprogramo?
- 2) Ĉu vi povas konsciencie aprobi la nunan forlason de partipolitika neŭtraleco, kiel montras la neapliko de la artikoloj 4 kaj 13 de la Statuto?
- 3) Ĉu vi konsentas pri la nunaj cenzurado kaj prisilentado en la publikaj aperantaĵoj en la kadro de UEA koncerne esencajn movadajn faktojn kaj problemojn?»

M. Sancho Izquierdo
Prezidanto

I. Dratwer
J. Régulo Pérez

Oton Pancer

H. V. Rasmussen
Jean Thierry

Vicprezidantoj

S. Gumá

D. Luez

Sekretarioj

KOREGAN DANKON

Okaze de mia 50-jara seninterrompa laboro por la Internacia Lingvo mi ricevis amason da esprimoj de simpatio kaj apogo.

Ne povante skribi al ĉiu aparte, mi plej varme kaj tutkore publike dankas al la iniciatintoj de la tuta aranĝo, al la partoprenintoj de la renkontiĝo kaj de la luksa bankedo en Jaca la 25-an de julio, al la geamikoj, kiuj tiuokaze alparolis la ĉeestantojn kaj min, al ĉiuj kontribuintoj por la belega ora manhorloĝo kiel komuna donaco kaj al pluraj unuopuloj pro iliaj apartaj personaj donacoj, kiel ankaŭ al ĉiuj sendintoj de leteroj kaj telegramoj pro iliaj esprimoj de rekono, gratuloj kaj bondeziroj.

Por mi persone kaj, mi fidas, por la partoprenintoj ĉio-ĉi kaj la tuta agordo de la brila 4-a Konferenco estas ege kortuŝa kaj tre kuraĝiga. Montriĝis ankoraufoje, ke la spirito de la neŭtrale homa, eksterpolitika kaj neekskluziva, sed vaste multifaceta humaneca internaciismo, nedisigeble ligita al Esperanto, unuvorte la tradicia zamenhofa esperantismo, estas nedetruibla. En tiu spirito ni plu iru nian vojon.

Ivo Lapenna

Raporto pri la Elementa Kurso de Esperanto por Neesperantistaj Geinstruistoj

Okazinta en Jaca de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1978

En la kadro de la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, mi, Daniel Luez, gimnazia instruisto pri lingvoj (germana kaj hispana), gvidis laŭ la Cseh-metodo elementan kurson de Esperanto. La lecionoj okazis ĉiutage (krom en la tago de la tuttaga ekskurso). Estis ĉiutage du lecionoj de po unu horo kaj duono, unu matene kaj la alia posttagmeze.

Deko da personoj partoprenis en tiu kurso. Kelkaj el ili estis jam esperantistoj, kiuj deziris havi modelon de Esperanto-kurso, por eventuale gvidi mem similan kurson. Aliaj estis personoj, kiuj antaŭe nenion sciis de nia internacia lingvo, kaj kiuj tiel komencis lerni ĝin. Tiuj novaj lernantoj, hispanoj kaj unu francino, ĉeestis akurate kaj laboris kun ĝojo kaj eĉ entuziasmo, kaj dank' al la cseh-metoda sistemo, kiu unufoje pli montriĝis efika, ili parolis esperante ekde la unua kurshoro. Mi sukcesis lernigi al ili la tutan gramatikan strukturon de la lingvo kaj grandan parton de la baza vortaro. Ĉe la fino de la kurso ili facile komprenas ordinaran konversacion laŭ normala ritmo, eĉ kiam mi improvizas tiun konversacion kun ili, kaj eĉ ekestis viglaj diskutoj jam tute en Esperanto! Se vi konsideras, ke antaŭ ok tagoj ili sciis nenion da Esperanto, kaj ke ĝuste antaŭ unu semajno hodiaŭ (sabaton la 22-an) je la horo, kiam mi parolas al vi! mi donis al ili la unuan lecionon, vi nepre devas konscii, ke tio estas tre kuraĝiga rezulto, kiu pruvas samtempe la intereso de la gelernantoj pri nia lingvo kaj ĝian facilecon.

Mi devas danki S-ron Francisco Zaragoza, estron de la hispana sekcio de ILEI, kiu ĉiam ĉeestis kaj alportis al la gelernantoj konstantan kuraĝigon. Estis ankaŭ granda honoro por mia kurso la ĉeesto de S-ro Félix Navarro, konata Esperanto-instruisto en Hispanujo en universitata medio.

Mi esperas, ke simila kurso okazos ĉiujare en la kadro de la venontaj Konferencoj de NEM kaj ke la nombro de la partoprenantoj estos pli alta ol en tiu unua paŝo, kiu montriĝis tiel kuraĝiga.

D. Luez

KION VI NE LEGOS ALILOKE

PUBLIKA LETERO DE D-RO SALAN AL D-RO TONKIN

Sube ni publikigas la tekston de letero, kiun D-ro G. Salan, la aŭtoro de la broŝuro «UEA kaj Neŭtraleco», sendis la 14-an de aŭgusto 1978 al D-ro H. Tonkin, prezidanto de UEA. — La Redakcio.

Al D-ro H. Tonkin
Prezidanto de UEA

Nimo, 14.8.78.

Estimata Samideano.

Bv. akcepti ĉi nefermitan leteron.

Kiel vi ne povas ignori, la 4-a NEM-Konferenco okazis en Jaca de la 22-a ĝis la 29-a de pasinta julio. Mi ĝin partoprenis kiel sendependa observanto por ne perdi ĉiun kontakton kun internacia esp-movado. Mi ja ne emis veturi al Bulgario, kie la homaj rajtoj ĝemas en katenoj. Restis do nur Jaca.

Dum tiu Konferenco mi eksciis, ke vi neniam publikigis en *Esperanto* leteron, kiun al vi sendis D-ro I. Lapenna post la Hamburga Kongreso, letero en kiu li klarigis al UEA-anoj la kialojn de sia eksigo el ĉiuj siaj UEA-postenoj.

Tia cenzuro koncerne homon, kiu estis unu el la plej efikaj arkitektoj de UEA, la plej orbuŝa de ties oratoroj, la plej profetdona de ties aktivuloj, la plej populara kaj la plej aplaŭdata de ties prezidantoj, estas absolute senprecedenca en kiu ajn libera lando rilate al kiu ajn agadkampoj, kaj tamen UEA-sidejo ankoraŭ troviĝas, kaj Lapenna kaj vi mem ankoraŭ vivas en liberaj landoj.

En tiu okazo UEA ne elmontris tre multe da digno kaj da honorsento, sed ja obstinan volon detrui eĉ la memorojn al homo, kies eksterordinara kompetenteco timigas ĝiajn estraranojn.

Kaj tion vi kapablis efektivi nur dank' al la politika helpo de l'kompartiaj gvidantoj de la orienteŭropaj esperanto-asocioj.

Ĉu tio povus signifi, ke vi intencas resti en la historio de l'neŭtrala esp-movado la responsulo, kiu ĝin alkondukis en orienteŭropajn gulagojn?

Sincere via,
D-ro Salan

LA JOTA KAJ NIA ARAGONA SENTO

Karaj gesamideanoj:

Miaj fizikaj fortoj absolute ne permesas al mi prepari longan paroladon pri nia tuta aragona folkloro; tamen mi povas — kaj tre plaĉe faras tion — prezenti al vi skizon pri la temo: «La Jota (prononcu *Hota*) kaj nia aragona sento», kiu, programe kiel antaŭparolo al la aragona folkloro festo oferita al la partoprenantoj de la IV-a Internacia Konferenco de NEM ne povis realiĝi en tiu okazo, kaj nun mi oferas ĝin al ili en la paĝoj de HORIZONTO.

Antaŭ ĉio mi devas diri ke en la aragona folkloro ne nur ekzistas la Jota, kvankam sendube ĝi estas la plej konata kaj konstituas la plej altan esprimon de nia folkloro, tiamaniere ke ĝi fakte malaperigis tiujn aliajn formojn. Antaŭ ol ekzistis la Jota, jam ekzistis en nia regiono aliaj popolaj dancoj kiel la tiel nomitaj «Seguidillas» aŭ «Bolero», kiuj, kvankam troviĝas ankaŭ en la folkloro de aliaj regionoj, akiras en Aragono specialajn karakterojn. Ankoraŭ oni povas vidi kaj aŭdi la «Seguidillas» nomitaj «de Lecinena» (prononcu Lezinjena) nomo de aragona vilaĝo proksima al Zaragoza, aŭ la «Bolero de Caspe» (prononcu Kaspe), famkonata urbo pro sia rolo en la Historio de Aragono; ĝuste kun ĉi tiu «Bolero» komenciĝis la antaŭe dirita folkloro aragona festo.

Kiam do naskiĝis la Jota? Ne estas facile respondi al tiu demando nek diri definitivajn vortojn pri la debatita temo de ĝia deveno. Ni povas, tamen, aserti ke laŭ la plej komuna opinio, verŝajne, la Jota naskiĝis en la XVIII^a jarcento, ĉar en antaŭaj jaroj en kajeroj pri popolaj dancoj — tiel, tiuj inkluditaj por ekzerco de lernantoj en la «Muzika instruado pri la hispana gitaro» verkita en 1674 de Gaspar Sanz, fama vjolinisto naskiĝinta en la aragona urbeto Calanda (prononcu Kalanda) ne aperas la Jota kaj estas jam je la duono de la XVIII^a jarcento kiam en diversaj dokumentoj oni mencias ĝin kiel popolan dancon.

Estis je la komenciĝo de la XIX^a jarcento kiam, en similaj cirkonstancoj al tiuj, kiuj en aliaj landoj elstarigis ian kanton aŭ dancon, ekaperis la Jota kiel simbolo de Aragono kaj de ĝia sendependenco kaj poste fariĝis pli kaj pli populara enradikigante en la spiriton de tiu popolo.

Tio faris ke kiam la elstara rusa muzikisto Glimka vizitis Hispanion li komponis ĉarman Jota inspirite de nia aragona kanto kaj, siavice, kiam la franca Chabrier komponis sian rapsodion nomitan «Hispanujo» uzis kiel plej elstaran moti- von, tiun de nia Jota. Same, la plej famaj hispanaj muzikistoj verkis propran Jota-n aŭ uzis kiel ĉeftemon tiun de nia aragona

kanto. Pro tio mem la Jota forpelis al dua vico la aliajn esprimojn de nia regiona folkloro kiel mi jam diris.

La Jota estis unue danco kaj poste aperis la kanto por vigligi la gedancantojn. Ĝi ankaŭ estis uzata de kantistoj por amindumi virinojn; la tiel nomitaj «jotas de ronda»; «ronda» estas nokta vagado kiu permesas al la amindumanto konfesi sian amon sub la balkono de la amatino per la kantado de la Jota. Fine, aperis la Jota kiel nura kanto, kies diversajn stilojn interpretas unu kantanto aŭ kantantino aŭ okaze unu paro da gekantantoj akompanataj de kordinstrumentoj kiel la gitaro kaj la nomataj «pinĉilinstrumentoj» ĉar iliaj kordoj estas vibrigitaj, ne per la fingroj, sed per tiu pinĉilo, kiel la liuto kaj la *bandurio* (hispana citro).

La ritmo de la danco varias laŭ la regionoj, ekde la lanta kaj gracia movado de brakoj kaj piedoj de la Jota nomata «de la malsupra Aragono» ĝis la impeta rapideco de la tipa Jota de Zaragoza.

La kantebla strofo, koplo, estas nomata hispanlingve *copla* (prononcu kopla) aŭ *cantar* (kantar), kantaĵo, kaj ĝi konsistas el kvar oksilabaj versoj asonancitaj la unua kaj la kvara, liberaj de rimo la du aliaj. Kvar simplaj versoj en kiu —laŭpoezie diris Pérez Pardo— povas Aragono enfermi sian tutan vivon. Kiam oni kantas tiun strofon oni komencas je la dua verso, poste oni kantas laŭorde de la unua ĝis la kvara, oni ripetas la kvaran kaj fine oni kantas denove la unuan.

Sed jen nova demando: Kiu verkas la koplojn, ĉu ia persono, ĉu la popolo mem? Kompreneble ĉiu kantaĵo estis ĉiam verkita de unu persono, lerta aŭ mallerta, konata aŭ ne, sed poste la popolo adoptas kaj disvastigas tiujn koplojn kiuj iel spegulas ĝian propran senton (okaze, reformante ilin) dum la aliaj, forgesite baldaŭ malaperas.

Pro tio, la tipaj kantaĵoj de Jota kiuj, malgraŭ la paso de la jaroj, daŭras, ĝuste montras la veran karakteron de la aragonanoj. Tiel mi povis longe paroli en 1945, kiam mi fariĝis membro de la «Aragona Akademio de Noblaj Belartoj», pri «La Aragona karaktero laŭ la Kantaĵoj de Jota». Jen kelkaj vortoj pri ĉi tiu temo.

Unue, aperas en tiuj koploj la «simpleco», ne nur de ilia strukturo —kvar simplaj versoj, kiel mi jam diris— sed ankaŭ en la esprimo, neniel bombasta aŭ pompa, kiun la aragonano —mem simpla— faras de siaj sentoj. Poste, la «sincereco», okaze kruda sed ĉiam sen ebla konfuzo aŭ miskompreno.

Kun tiuj karakteroj montras niaj kantaĵoj la tipan «konstantecon» de la aragonanoj kiu ne estas nura obstino (kiel interpretas stultaj rakontoj) sed simple firma decido post pripensado. Tia konstan-

teco rilate al amo elmontriĝas en diversaj koploj en kiuj la kantisto komparas la firmecon kaj konstantecon de la vortoj per kiuj li promesis amon, al Kastelo de «Uncastillo» (aragona urbo) «kiu estas ŝtona kaj pro tio daŭra» aŭ al la ŝtona kolono kiu subtenas la skulptan bildon de la Sankta Virgulino.

Tiu lasta komparo kondukas min menci kiel multnombraj estas la aragonaj kantaĵoj kiuj esprimas la religian senton de nia popolo kaj la fervoran kulton al la Sankta Virgulino, precipe sub la titolo «de la Kolono» (hispanlingve «del Pilar»).

Mi devas ankaŭ citi kiel specialan trajton de la aragona karaktero ĝian fierecon kaj eksterordinaran amon al sendependeco, kiel montras la Historio. Tia fiereco kiu kreskas antaŭ ĉiu kontraŭstaro montriĝas en niaj kantaĵoj, ne nur rilate al publikaj eventoj, sed ankaŭ en la privata vivo kontraŭ familiaj oponoj.

Serioza kaj firma rilate al amo, la aragonano ankaŭ scias ĝin esprimi delikate kaj dece per belaj komparoj kiuj aperas en multnombraj kantaĵoj. Ekzemple tiu,

en kiu la kantanto diras por montri la firmecon kaj konstantecon de sia amo malgraŭ la foresto de lia amatino: «Ju pli profunda estas la puto — des pli malvarmeta eliras el ĝi la akvo; — pli malproksima estas vi de mi — des pli firma estas mia vorto». Mi povus ankaŭ citi kiel ekzemplon de delikateco tiun, en kiu la kantanto supozas vetludi vivon kaj animon je unu ludkarto de amo kaj tuj demandas al amatino ĉu ŝi posedas tian ludkarton.

Mi volas fine paroli pri la aragona humoro montrata en niaj kantaĵoj, kiu ne konsistas el vortludado, sed plibone, okaze, el ludado per ideoj; ankaŭ ne el la hiperbolo aŭ trograndigo de la andaluzoj sed kontraŭe el la troa ĝusteco; kaj farata ĉiam ironie sed evitante ĝenan satiron, «citronaj gutetoj — laŭ diro de D-ro García Arista — en glaso da malvarmeta akvo».

Kaj kun tiuj lastaj vortoj mi konsideras plenumita —kvankam mi timas ne sufiĉe bone— mian taskon.

Miguel Sancho Izquierdo

LA TAGO DE ZAMENHOF ALPROKSIMIGAS

Cu vi deziras aŭskulti dum viaj kunvenoj, la prelegojn pri la ĉeftemoj de la IV^a Internacia Konferenco de NEM, okazinta en Jaca (Hispanujo)?

La administracio de «Horizonto» prizorgas kopiojn.

Informas: Inés Gastón, P.^o Marina Moreno, 35, 4.^o dcha. ZARAGOZA-1 (Hispanujo)

FERIOJ EN RUMANIO XX

Monata ilustrita revuo eldonata de la Turisma Ministerio

Ni ricevis ekzempleron de speciala numero en Esperanto, Julio 1978.

Ne mirige la revuo fariĝis XX-jara ĉar ĝi estas ja interesa, riĉe ilustrita kaj bele prezentita. Ordinare ĝi aperas en la franca, germana, angla kaj rusa lingvoj. Espereble tiu ĉi numero en Esperanto ne estos la nura en la internacia lingvo, kio ebligos la pli vastan diskonigon de la kulturo kaj beleco de tiu pitoreska lando.

I. G.

LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fako) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.000 pesetoj plus 10 % por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.^o Marina Moreno, 35, 4.^o dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe ĉia libroservo.

IVO LAPENNA

lom pri lia vivo kaj agado en Jugoslavio

Okaze de iu sia prelego Ivo Lapenna iomete klarigis, kio kontribuis al liaj internaciaj sentoj, kiuj montriĝis jam dum sia juna aĝo. La hejmloko de lia familio estis la kroacia urbo Split, situata en Dalmatio, kaj tiu regiono estis dum jarcentoj sub influo de la transadriatika Italio. Dum Ivo estis gimnaziano, lia familio translokiĝis al la ĉefurbo de Kroatio Zagreb, kiu havis longdaŭran kontakton kun la germane parolanta Aŭstrio. Tiel li dum sia frua juneco multe kontaktiĝis kun du spiritoj kaj lingvoj, aldone al la kroato-serba. Lia pli posta vivo kondukis lin al kontaktoj kun la franca, angla, rusa kaj multaj aliaj lingvoj kaj aliaj naciaj kulturoj.

Lia studado de juro kun specialiĝo pri internacia juro kaj studo de la muziko (violonĉelo) ankaŭ indikas lian inklinon al internacieco. Kiel advokato — juĝista kandidato li kunlaboris ne kiu ajn advokato, sed kun doktoro Ante Ramljak, progresema nobla homo, kiun Lapenna tre interesigis pri Esperanto. d-ro Ramljak tiom entuziasmiĝis por tiu ĉi koncepto, ke li, en kunligo kun la invado de 1941 de la armeo de Hitler, en siaj por publikigo preparitaj manuskriptoj (*) skribis eĉ tion ĉi: «Pro defendo de la kulturo antaŭ perforto d-ro Lapenna kaj mi devis forkuri el Zagreb. La klopodoj de Lapenna en solvado de la internacia lingvoproblemo estas pli gravaj por la homaro ol la muziko de Beethoven aŭ la politiko de Churchill».

Iomete surprizinde estas ke d-ro Ramljak, apenaŭ kiel sesdekjarulo, post la Dua Mondmilito, ellernis la Internacian Lingvon, sed post tio ĉi li fervore agis por kaj per ĝi, en Sarajevo kaj sur la insulo Lopud.

Jam kiel deknaŭjara studento Ivo Lapenna estis en la jaro 1928 kunfondinto kaj unu el la plej fervoraj organizantoj de la progresema Studenta Esperanto Klubo, pli poste nomita Akademia Esperanto Klubo (mallonge A E K). Li gvidis multajn kursojn, verkis tiujn ĉi librojn: «Medjunarodni jezik u historiji i danas» (La Internacia lingvo en la historio kaj hodiaŭo), Zagreb, 1935, «Engleski ili Esperanto» (Ĉu la angla lingvo aŭ Esperanto), Zagreb, 1937, «Esperanto u deset lekcija» (Esperanto en dek lecionoj), unua eldono Slavonski Brod, 1937, kaj pli poste du pliaj eldonoj.

Kaj de tiu jaro 1928, la jaro de la fondiĝo de A E K, ekestis iaspeca tempesto de lia esperantista progreso: prezidanto de A E K, en la periodo 1929-1941 kaj 1945-1949, estrano de la Internacia Esperanto Ligo (mallonge I E L), pli poste de la Universala Esperanto Asocio (mallonge U E A), en la periodo 1938-1974, ties ĝenerala sekretario dum la jaroj 1945-1964 kaj prezidanto inter la jaroj 1964 kaj 1974.

Memkompreneble dum la okupo de Jugoslavio fare de ĝiaj malamikoj, t.e. en la periodo 1941-1945, la Jugoslavia Esperanto Ligo ne povis funkcii. Sed ankaŭ tiam li agis kiel vera humanisto Esperantisto: li intencis savi homojn, kiuj kiel Esperantistoj estis kontraŭ la nazistoj kaj faŝistoj, kuraĝe enirinte en la jam sigelitan ejon de la societo A E K kaj bruliginte la tie de li forigintan membroliston. Bedaŭrinde Lapenna tamen ne povis malhelpi la mortigon de kelkaj el ili, ĉar ili estis denunciataj de iuj perfiduloj (vidu «Horizonto», III-a jaro, N.º 14 (2), paĝo 49).

En Julio 1941 Lapenna sukcesis fuĝi el Zagreb en Split, kie la faŝista polico feliĉe ne disponis je informoj pri liaj humanecaj internaciismaj ideoj kiel la polico de Zagreb. Tie li ne kaŝis sin, sed kunlaboris kun la loka organizo de la naciliberiga movado. Post la falo de Mussolini kaj mallonga liberigo de la urbo Split, plenumita de ne tro multnombraj taĉmentoj de la «Naciliberiga Armeo de Jugoslavio» (mallonge nomita N O V J), pro atakoj de fortaj taĉmentoj de la hitlera armeo, en Oktobro 1943, Ivo Lapenna devis kune kun la menciitaj jugoslaviaj partizanoj retiriĝi en la proksiman montaran regionon. Tie, ĉe la limo inter Bosnio kaj Dalmatio, en la urbeto Livno, kvankam pro sia kapablo ŝargita per gravaj taskoj en apartaj «partizanaĵoj cirkonstancoj», li organizis eĉ konferencon de iu grupo da Esperantistoj, hazarde troviĝantaj en la proksimaj taĉmentoj de la armeo «N O V J».

En Januaro 1944 Lapenna estis translokitigita el la montara bataalkampo en la ĵus organizitan jugoslavian armean bazon en la regiono de la urbo Bari (suda Italio). Tie, post la agnosko de la Naciliberiga Movado kaj de la armeo de Tito, flanke de la koalicio Churchill-Roosevelt-Stalin kaj la interkonsento inter la gvidantoj de la aliancaj armeoj la brita, la usona kaj la N O V J, la tiama jugoslavia leŭtenanto Ivo Lapenna, avancinta

pli poste ĝis la rango de majoro, fariĝis redaktoro de la gazeto «Glas Ujedinjenih Nacija» (Voĉo de la Unuiĝintaj Nacioj). Tuj post tio, komence de la jaro 1944, en la dek milionoj da gazetoj, disjetadataj el aliancaj aviadiloj super la teritorio de la ankoraŭ okupataj aŭ duonliberigitaj partoj de la teritorio de Jugoslavio, oni ne povis plu legi la mensogajn informojn pri la heroismo de la perfiduloj, gvidataj de la reĝa generalo Draĝa Mihajloviĉ, sed la veron, nome ke la tuta ŝarĝo de la naciliberiga milito kuŝas sur la ŝultroj de la batalantoj, apartenantaj al la armeo «N O V J» de Josip Broz Tito.

Estas menciinde, ke dum tiu sia ofico en Bari d-ro Lapenna sukcesis plurfoje renkontigi malgrandan grupon da Esperantistoj, kiuj tiam, hazarde tie agadis aŭ kiel oficiroj aŭ kiel soldatoj britaj, jugoslavaj kaj usonaj.

Ivo Lapenna daŭrigis sian laboron kiel ĵurnalisto en unu el la plej gravaj gazetoj de la jugoslavia naciliberiga movado, nome en la gazeto «Slobodna Dalmacija» (Libera Dalmatio), en la printempo kaj somero de la jaro 1944 sur la insulo Vis, kaj ekde Oktobro 1944 en la jam liberigita urbo Split.

Post la liberigo de la tuta lando, okazinta en Majo 1945, la registaro de la Respubliko Kroatio translokiĝis en la ĉefurbon Zagreb kaj tuj troviĝas d-ro Lapenna en grava pozicio de la Ĉefo de la Informa Fako de la Registaro de Kroatio. Novan, eĉ pli gravan taskon baldaŭ oni donis al li. Komenciĝis abunda leĝdona aktivado de la novaj ŝtataj aŭtoritatoj kaj grandan laboron havis la nova ĉefredaktoro de la oficiala gazeto «Narodne Novine» (Popola Gazeto), Ivo Lapenna zorgis pri la publikigado de ĉiuj leĝoj kaj dekretoj de la lando Kroatio. Samtempe unu post la alia aperadis liaj ĵursciencaj artikoloj.

Maturiĝis la cirkonstancoj por ke la juraj, diplomaciaj, politikaj kaj prelegaj spertoj de Ivo Lapenna estu plene utiligitaj por plua riĉigo de la jura praktiko kaj scienco, tiamaniere por la edukado de la pli junaj generacioj. Tial la Fakultato pri Juro de la Universitato de Zagreb malfermis al li sian pordon.

Li prelegis pri la «Juro de Unuiĝintaj Nacioj», pri la «Historio de Diplomatio kaj de la Internaciaj Rilatoj» kaj aldone pri la «Historio de Politikaj Doktrinoj». Pri la «Juro de Unuiĝintaj Nacioj» li prelegis ankaŭ en la Fakultato pri Ekonomio de la sama Universitato.

Krom okaze de prelegoj faritaj en la Universitato oni lin povis aŭskulti en la «Pučko Sveučilište» (Popola Universitato) en Zagreb kaj aliloke, kiam li antaŭ amasa publiko plej ofte parolis pri demandoj el la problemaro pri internacia juro.

La fruktoj de la scienca laboro de la universitata profesoro Lapenna estis krom lia ĉefverko «Ujedinjene Nacije» (Unuiĝintaj Nacioj), Zagreb, 1946, 235 paĝoj, verŝajne la unua kompleta libro pri la U N en la monda literaturo, tuta aro da ĵursciencaj artikoloj aperintaj en tri sciencaj revuoj de Jugoslavio: «Zbornik» (Kolekto da artikoloj kaj aliaj sciencaj priskriboj en la jarlibro de la Fakultato pri Juro), «Arhiv za pravne i društvene nauke» (Arkivo de Juraj kaj Sociaj Sciencoj), kaj «Naša zakonitost» (Niaj Leĝoj), kiu estis la ĉefa jura periodaĵo de Jugoslavio. En la du unue menciitaj periodaĵoj Lapenna ankaŭ estis membro de la redaktaj komitatoj. Li ankaŭ ne neglektis publikigi popularajn artikolojn pri de li esplorataj temoj en la gazeto «Vjesnik» (Heroldo).

Bona sciencisto ne kutimas foresti el la praktika vivo, kion ankaŭ pravas la partoprenado de Ivo Lapenna en la laboro de la Packonferenco en Parizo, post la Dua Mondmilito, kie li estis eksperto pri internacia juro en la jugoslavia delegacio, kaj li finredaktis ĉiujn amendojn de Jugoslavio al la Projekto de la Packontrakto kun Italio. Krome tre interesa estis lia agado de advokato — konsilisto antaŭ la Internacia Kortumo en Hago, en la jaroj 1947 kaj 1948, en la fama proceso inter la Unuiĝinta Regno kaj Albanio, pro la incidentoj en la Markolo de Korfu. Plenumadi tian taskon estas preskaŭ la maksimumo atingebla en ĵurscienca praktiko.

Paralele kun tiu ampleksa faka kaj scienca laboro, Lapenna daŭrigis sian laboron por Esperanto en: fondo de la zagreba societo, nomita «Bude Borjan» je memoro de la mortigita revoluciulo, en revivigo de la Jugoslavia Esperanto Ligo, kies prezidanto li estis, kaj fine en la estraro de UEA.

Kiam oni prijuĝas profesoron Ivo Lapenna post pli ol kvardek jaroj da kunlaboro kun li, kio signifas dum kvar kvinonoj de liaj nun festataj kvindek jaroj de poresperanta laboro, certe ne estas facile esti konstante objektiva, ĉar oni ne povas forgesi la impreson kiu ekestis dum la unua renkonto.

Ĝi okazis fine de la jaro 1936, ĉar la agronomo Oton Pancer deziris plenumi la postulon de iu el siaj lernantoj, nome ke li iamaniere instruu la lernantojn en la meza agrikultura lernejo en Krizevci ne nur pri pedologio (scienco pri grundo) kaj pri la germana lingvo, sed ankaŭ pri Esperanto, kiun li iam estis menciinta dum la leciono de la germana lingvo. Kaj kiel fari tion ĉi en malgranda urbo fore de Zagreb sesdek kilometrojn, kie tiam ne ekzistis iu Esperantisto, kaj la proponita instruisto estis nur aŭdinta dum sia infanaĝo de sia patrino, kiam Zamenhof ankoraŭ vivis, pri «la nobla doktoro kiu deziris interfratigi ĉiujn homojn per unu komuna lingvo». Vere li kiel studento estis enskribinta, sub la influo de tiuj ĉi vortoj de la patrino, la prelegojn pri Esperanto de d-ro Dušan Maruzzi, sed ne havis da tempo aŭskulti ilin.

Tre afable akceptita de la juna juristo Lapenna li ricevis abundajn informojn, liajn librojn pri la problemoj kaj la lernolibron, ĵus aperintan, aldone, kio estis plej grave, ĉio estis direktita al kuraĝigo de la memlernanto kaj samtempe prelegonto. Ne pasis du jaroj, kaj el manoj de la prezidanto de la ekzamenkomisiono, nome de Ivo Lapenna, la preleganto ricevis la diplomon, portantan la numeron unu, pri instrukapablo. La kunlaboro de ni du daŭrigis dum sporadaj renkontoj dum la milito, en Dalmatio kaj Italio, post la milito en la societo «Bude Borjan», en la komitato de UEA kaj finfine en la Neŭtrala Esperanto Movado.

Ni ebligu manifesti sian estimon al Lapenna ankaŭ aliajn personojn, kaj por spacomanko almenaŭ du elstarajn.

La tro frue mortinta jugoslavia diplomato Zdenko Štambuk, iam ambasadoro en Hago, invitis, okaze de la Universala Kongreso, en 1964, grupon da elstaraj Esperantistoj el Jugoslavio. Aparte li al mi komunikis la mesaĝon ke mi venigu ankaŭ d-ro Lapenna, kiu tiam ne plu estis profesoro en Zagreb, sed en la universitato de Londono. La ambasadoro serioze riproĉis, kial Lapenna ne venis, kaj eĉ malgaja aŭskultis la eksplikon, ke Lapenna kiel ĵus elektita prezidanto de UEA laŭ la kongresa programo nun devas prezidi en la kunsido de la nova estraro. La ambasadoro aranĝis apartan aŭdiencon por Lapenna kaj gastadis lin pli longe ol ke oni povus supozi, konsiderante lian okupitecon.

Antaŭ nelonge, dum la preparado de tiu ĉi artikolo pri la jubileulo Ivo Lapenna mi havis kontakton kun la jam pensiita universitata profesoro d-ro Staniša Kostić, antaŭmilita jugoslavia aktiva oficiro, militkaptito en Germanio, postmilita oficiro de la armeo de Tito, pli poste studento de la Fakultato pri juro en la universitato de Zagreb. Montrante sian studentan indekson li kun fiero komunikis al mi, ke li estis la unua ekzamenita pri la «Historio de la Politikaj Doktrinoj» kaj ke profesoro Lapenna enskribis la plej altan noton 5. Krome li montris siajn du lernolibrojn, aperintajn en Zagreb, en la jaro 1967, «La Internaciaj Rilatoj» kaj «La Internacia Juro kaj la Internaciaj Rilatoj», kaj en ĝi la citadon de la verko de Lapenna pri la Unuiĝintaj Nacioj, aperinta en la jaro 1947, kaj ke li substrekis, ke li alte taksas ankoraŭ hodiaŭ la menciitan libron de Lapenna. Ĉe la fino de nia interparolo profesoro Kostić klare esprimis sian ĝeneralan opinion pri profesoro Lapenna: bonega prelegisto kaj sciencisto, eminenta oratoro, humaneca kolego kaj granda amiko de la junularo. Simila konkludo pri la instrukapablo de Ivo Lapenna estis en la sama semajno aŭdigebla de iu alia profesoro, kiu tamen ne montriĝis kiel granda amiko de la jubileulo.

Ion favoran signifas la fakto, ke la zagrebaj studentoj ankaŭ post la foriro de profesoro Lapenna studadis liajn prelegojn, el la de ili en la jaro 1949 publikigitaj aŭtorigitaj instruaj paroladoj pri la historio de diplomatio, en du volumoj (93 kaj 193 paĝoj).

Oni povus opinii, ke ne estas necese, parolante pri la jubileulo dum lia restado en Jugoslavio tuŝi lian agadon post tiu ĉi periodo, ĉar ĝi estas jam ofte prezentita. Vaste estas jam publikigitaj la malfavoraj opinioj pri li kaj eĉ atakoj kaj kalumnioj kontraŭ li, devenintaj preskaŭ nur el esperantistaj rondoj. Ĉar ili estas detale priskribitaj en la libro de Lapenna «Hamburgo en Retrospektivo» kaj dokumentitaj, mi limigos min al du okazaĵoj neforgeseblaj por mi.

Grupo de komitatanoj de UEA ne povis esti kontentaj rilate la rezulton de la elekto de la nova prezidanto de UEA, en Hago, en la jaro 1964, ĉar ne voĉdonis por tio ĉi granda plimulto. Por ripetita voĉdonado kaj pli posta preskaŭ unuanima ege batalis elstara komitatano de UEA, kiu en la jaro 1974 agis tute kontraŭe, ne povante iun konvinki pri la pravigo de tiu ŝanĝo de konduto.

Eĉ homoj kiuj opinias, ke ili estas kapablaj objektivie taksi profesoron Ivo Lapenna, iomete miris aŭskultante, kelkajn jarojn pli poste, okaze de la Universala Kongreso en Vieno, eĉ tro flatan prezentadon de la persono kaj agado de la hodiaŭa jubileulo, eldiritan de iu elstara komitatano de UEA, kiu ankaŭ en Hamburgo agis tute kontraŭe. La libro «Hamburgo en Retrospektivo» dokumentite klarigas la kaŭzojn de tia kaj simila agado, en multaj de tiuj okazoj.

Cerbumante pri la fenomeno profesoro doktoro Ivo Lapenna kaj pri la supre menciita konduto de iu nombro de liaj kontraŭuloj kaj malamikoj mi faras la konkludon ke por multaj el ili oni povus apliki la versojn el la fama poemo de la konata verkisto el Kroatio Ivan Majuranić «La morto de Smailagao Ĉengiĉ» (traduko de Josip Velebit, Kroatia Esperanto Ligo, Zagreb, 1972).

«Muso mordetas, sed sur ter' vegetas
Nur aglo al ĉiel' sin direktas.»

(*) Marinko Gjivoje: La paperoj de d-ro Ramljak, Internacia Kultura Servo, N.º 4, Zagreb, 1973.

POSTKONFERENCAJ KONSIDEROJ

Veninte hejmen post la Konferenco de N.E.M. ni repaŝas en la reala vivo, la ĉiutaga, kvazaŭ vekiginte el agrabla sonĝo, kiu daŭrante unu semajnon, pasis en nia spirito kiel sendaŭra momento.

Kiom da internaciaj konferencoj aŭ kongresoj, tiel oftaj, tiel abundaj en nia tempo, povus profite rigardi nian ekzemplon!

Kie, en malpli ol cent ĉeestantoj, kiel en nia rondo, troviĝas anoj de dek nacioj, malgraŭ la perforta manko de nombraj alinacianoj, kiuj kun dekoj da milionoj da samsortuloj vivas enfermite kiel cirkaj leonoj en la vastaj kaĝoj — eĉ senpordaj — de l'mal-demokrataj «demokratejoj»? Kie, la kleregaj reprezentantoj de potencaj registaroj aŭ de industriaj korporacioj, aŭ de sciencistaj asocioj povas senpere diskuti kaj esprimi sin libere, normale, nature, sen helpo de interpretistoj kaj sen humiliĝo al fremda lingvo, en lingva egaleco?

Ni revenis hejmen. La bela sonĝo, kiu nin ĉarmis, jam ĉesis. Ni repaŝas sur la reala, ne tro bela aŭ malbela mondo. Ni rehavas antaŭ ni la problemon — kaŭzo kaj celo — de nia momenta kolektiĝo en la urbo Jaca. Ni traktis diligente, esploris detale, analizis skrupule kaj studis ĉion, kio koncernas la neŭtralecon kaj la malneŭtraligon de U.E.A. Ni faris resumon, decidojn kaj rezolucion. Nun ni devas unuope, dekope kaj centope agadi por la politike neŭtrala, sed humaneca kvintesenco de Esperanto kaj de ĉiu asocio ĝin reprezentanta.

Nia kolektiĝo en Jaca, niaj amikaj kunsidoj donis al ni scion, forton kaj rimedojn. Solvate antaŭ ni staras la Problemo. Ni ne finis, sed nur komencis, kaj eble ni povus trankvilete dormi se endanĝerigus nur ia difinita asocio de Esperanto, eĉ se tre grava. Ni karesis kaj dorlotis Esperanton dum nia tuta vivo kiel sendependan, liberan kaj neŭtralan Idealon. Nun nia ĉielo estas malserena. En la «totalecaj» landoj, nenia grupo, nenia societo, nenia asocio estas sendepende libera; tie ĉio turniĝas — aŭ devas turniĝi — ĉirkaŭ unu centra akso trenanta tiel la korpojn kiel la spiritojn. Tial se iam el tiuj landoj venas al ni komisiono — eĉ se nur esperantista — sendube gvidas ĝin nevidebla kapo politika, kiu sufloras, sugestas, indikas, ordonas aŭ decidas.

Enlasi en Universalan Esperanto-Asocion tiajn grupojn aŭ asociojn absolute dependajn de politika partio, estas danĝere; danĝere, ĉar la landoj de «totaleco» ne rezignas vegeti, sed aktive enŝovas siajn agentojn en ĉion imageblan, ekz. sporton, pacmovadon, arton k.t.p., kaj malgraŭ ateisteco, eĉ en la katolikan eklezion. Ĉu absurde?

Post la intercivitana milito en Hispanujo ni povis aŭdadi dum jaroj per alilandaj radio-elsendoj: «Respublikanoj, socialistoj, katolikoj, komunistoj... agadu kune kontraŭ la nunaj regantoj!!» Kaj per la sama voĉo ni sciigis ke la plej efika kaj agema organizo estas tiu de la Partio. Ĉu absurde?

Tutmonda Organizo kiel Esperanto, estas grava afero. El totaleca vidpunkto, kian rolon ludu Esperanto? Ĝi devas graviti ĉirkaŭ la partia doktrino, turniĝi ĉirkaŭ la aludita akso. Kiel universala forto reprezentanta la liberecon en la interrilatoj kaj la internacian humanismon, Esperanto estas perturba, kontraŭa kaj malutila rimedo, do kaperinda. Konsekvence en tiuj malfeliĉaj landoj oni ne povas favori Esperanton kaj fakte iliaj estroj neniam favoris ĝin, ĉar eĉ kaperite, ĝi certe plu servus la veron al ili malagrablan. Nu, por kio do la malneŭtraligo, la ekglito en tiun sferon? Ni havas martirojn tie, kaj ni ne forgesos ilin. Kiu lojalulo estas preta kise leki la manon al la martirigintoj?

Esperanto ne plu estas kuriozaĵo, sed vivanta lingvo de tutmonda uzantaro. Tial la Kvara Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kritike konsideris malfavora la laŭmodan agitadon por tio, kion oni nomas nun bombaste interlingvistiko, lingvo-planado kaj similaĵoj povantaj dubigi interesiĝantojn kaj konfuzi freŝajn adeptojn. Certe, nenio estas perfekta en nia homa mondo; ankaŭ ne Esperanto; sed mi vane serĉadis tiun belan saĝulon kapablan difini al mi la perfektecon de la homa lingvo.

Car la plua ekzisto de Esperanto dependas de ĝia absoluta sendependeco, de la neŭtraleco de ĝia manifestiĝo kaj de la eksterpolitika agado de ĝiaj organoj, ni postulas la partipolitikan neŭtralecon de Esperanto kaj de ĝia Universala Asocio fondita antaŭ sepek jaroj por ĉiu homo, sen diskriminacio, ekster ia obskuraj manovroj kaj intrigoj de la al nia Afero ruiniga politikado.

Salvador Guma

LA POLITIKA KAJ LINGVA MAPO DE EŬROPO

Aktuala kaj Potenciala Roloj de la Internacia Lingvo

1. Enkonduko

En prelego farita dum la pasintjara Konferenco de NEM estis pritraktita la lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj de Eŭropo. Surbaze de tiu kaj aliaj prelegoj, kiel ankaŭ de ideoj esprimitaj en la diskutoj pri la temo, estis ellaborita projekto de Memorando kaj Perspektiva Agadprogramo de la Eŭropa Klubo por la Solvo de la Lingva Problemo en Eŭropo. Ĝi konsistas el kvin mallongaj ĉapitroj, titolitaj Eŭropo Hodiaŭ, La Lingva Problemo, Aktivadoj en Kvin Direktoj, Organizaj kaj Financaj Demandoj, Konkludo.

La projekto estis unue publikigita en *Horizonto* n-ro 6/77¹⁾. En novembro 1977 ĝi estis multobligita kaj distribuita al la membroj de Eŭropa Klubo en la originala lingvo kaj en germana traduko. Bedaŭrinde, la novembra jarkunveno de la Klubo ne havis sufiĉe da tempo por atente pridiskuti la tutan ampleksan dokumenton kaj tial ĝi akceptis la projekton kiel provizoran Agadprogramon ĝis la sekvanta jarkunveno, kiu devus decidi pri la definitiva teksto.

La tezoj, kiuj konsistigas la unuopajn ĉapitrojn de la menciita dokumento, estas rezulto de historiaj esploroj kaj atentaj studoj de la nuntempo. Preskaŭ pri ĉiu el ili oni povus fari plurajn pliajn prelegojn, skribi pliajn longajn artikolojn kaj pri kelkaj el ili eĉ verki tutajn monografiojn. En la hodiaŭa prelego estos prilaboritaj iom pli detale nur la tezoj rilatantaj al la politika kaj lingva situacio en Eŭropo, precipe tiuj entenataj en la sekcioj 1.11, 1.13 kaj 1.2 de la Agadprogramo, kiel ankaŭ al la nuna kaj potenciala roloj de la Internacia Lingvo (Esperanto) en tia situacio. Tiusence la nuna ĉeftemo estas nenio alia ol plivastigo kaj pliprofundigo de la pasintjara.

La aktuala politika kaj lingva mapo de Eŭropo estas nedisigeble ligita al ekesto kaj evoluo de la modernaj nacioj en etna senco de la vorto kaj al la paralela formiĝo de iliaj komunaj naciaj lingvoj. Ambaŭ estis rezulto de la materiaj fortoj ekĝermintaj jam en la sino de la eŭropa tipo de feŭdismo, kies lingva esprimo estis la mezepoka latina. Tial, por bone kompreni la priparolatan demandon, necesas unue diri kelkajn vortojn pri la esencaj karakterizoj de la feŭdismo en Eŭropo kaj pri la rolo de la latina kiel kuntena lingvo de tiu sistemo.

2. Feŭdismo kaj Naskiĝo de Nacioj

En feŭdismo la ĉefa formo de proprieto,

decida por la karaktero de la tuta sistemo en sia evoluinta formo, estis la feŭdo, t.e. bieno kun ĉiuj instalaĵoj sur ĝi, inkluzive la laborforton, donita de suzereno (feŭda mastro) al vasalo (feŭda subulo), kiu kompanse devontigis sin al fideleco kaj diversaj servoj, unuavice militservo, kaj kontribuadoj.

La feŭda bieno produktis praktike ĉion, kio estis necesa por kontentigi la bezonojn: ne nur nutraĵojn — panon, viandon, trinkaĵojn, ktp. — sed ankaŭ ĉiaspecajn metiaĵojn, de vestaĵoj kaj loĝobjektoj ĝis armiloj. La divido de la laboro estis minimuma. La interŝanĝoj okazadis ĉefe en la formo de produkto por produkto kaj tre malmulte pere de mono. Grandaj merkatoj ne ekzistis. Ĉiu feŭda bieno estis aparta ekonomia unuo, disigita de la aliaj per muroj de ekonomia memsufiĉo.

En la mezepokaj urboj, kvankam ili havis apartajn socian rolon kaj juran pozicion, la situacio ne multe diferencis tiurilate. La civitanoj — burĝoj — posedadis tie ne nur siajn metiejojn, sed ankaŭ siajn proprajn domojn, siajn ĝardenojn, korto-birdojn ktp. Ilia mastrumado sufiĉis por kontentigi la hejmajn bezonojn. La metiistoj estis organizitaj en gildoj kun ege striktaj reguloj. La metia produktado estis farata ne tiom por la merkato, do por la nekonata aĉetonto, sed surbaze de mendoj. Do, ankaŭ la urbaj mastrumoj estis fakte fermitaj ekonomiaj tutejoj.

La organizo de la socia vivo fidele spegulis la ekonomian realaĵon. La grandega plimulto de la popolo — la servutuloj — estis ligita al la tero. Latine oni tion diradis «*glebae adscripti*». Ili ne rajtis forlasi la feŭdan bienon. Se la bieno transiris de unu posedanto al alia, ankaŭ la servutuloj ricevis novan mastron. Ili estis konsiderataj kiel parto de inventario. La amasoj — krom en kazoj de spontanaj ribeloj — havis preskaŭ neniam reciprokajn kontaktojn. Nur la eklezio, la nobelaro kaj la tiama sciencularo kontaktis sur vastaj teritorioj. Tia stato de la socia vivo havis gravajn sekvojn ankaŭ sur la lingva kampo. La popolaj amasoj parolis sennombrajn dialektojn en diversaj lokaj lingvoformoj, dum la ekonomie regantaj rondoj, ligitaj per komunaj interesoj tra la tuta Eŭropo, utiligis la latinan kiel komunan klasan lingvon. Tio, siavice, plifirmigis la solidarecon en la suproj de la feŭda socio, sed, aliflanke, kontribuis al ankoraŭ pli granda diserigo de la bazo.

La ekonomia disrompiteco troviĝas en la radikoj mem de feŭdismo. Tamen, ne povis tuj speguliĝi ankaŭ je la politika organizo de la socio. La fondintoj de la

t.n. barbaraj ŝtatoj, post la faligo de la Okcidenta Romia Imperio en la kvina jarcento, disdonadis la terojn de la subigitaj teritorioj al siaj parencoj, generaloj, kunlaborantoj kaj al la eklezio. Sin rigardante proprietuloj de la tuta tero en la okupitaj landoj, ili sukcesis centriĝi en siaj manoj grandegan potencon kaj krei larĝaj politikajn unuiĝojn. Tio povis okazi nur en la frua feŭdismo, kiam la nova ekonomia kaj socia ordo ne estis ankoraŭ sufiĉe fortika kaj kiam la personaj ligoj de dankemo, sindono kaj ĵurita fideleco al la reĝo fare de la nova nobelaro estis ankoraŭ tro freŝdataj kaj tro signifaj por esti facilanime neglektataj.

Por tiu ĉi unua periodo, ne same longa en ĉiuj feŭdaj ŝtatoj de Eŭropo, oni fakte povas diri, ke la ŝtata konstruaĵo similis al piramido. Sur la pinto troviĝis la reĝo, la bazon formis la servutulaj amasoj, dum la intertavoloj konsistis el multnombraj malpli kaj pli grandaj nobelaj sinjoroj, ligitaj al siaj suzerenoj per vasala fideleco, ĵure konfirmita. Sed tiu piramido, en kiu la politika ordo ne respondis al la evolutendenco kondiĉita de la ekonomia strukturo, estis renversita kaj kuŝis aŭ, pli bone, balanciĝis sur sia pinto.

La plifirmiĝo de la feŭda ekonomia sistemo, akompanata de la samtempa malfortiĝo de la personaj ligoj en la feŭdula hierarkio, baldaŭ disrompis la kunligajn fadenojn kaj tiu piramida palaco falis pro la premo de sia propra pezo kaj diseriĝis. La sama sorto trafis ĉiujn grandajn mezepokajn ŝtatojn. Ĝi trafis eĉ tiel grandajn potencojn, kiaj estis la ŝtato de Karlo la Granda (9-a jc.) kaj la Kieva Ŝtato de la Rjurik-oj (10-a jc.). En la epoko de triumfo de la naturala ekonomio, en kiu oni interŝanĝis rekte produkton por produkto kaj kiu tial, laŭ sia esenco, mem, disrompis la socion en sennombrajn malgrandajn unuojn, ĉiu fortostreĉo krei grandajn politikajn unuiĝojn devis malsukcesi. La centrifugaj fortoj en la ekonomia bazo ne povas esti venkitaj de la centripetaj fortoj en la politiko.

Tiele, baldaŭ ankaŭ la politika strukturo respondis al la ekonomia kazo. Formale, la reĝo estis plu konsiderata ne nur kiel tenanto de la supera politika potenco, sed ankaŭ kiel privata proprietulo de la tuta lando. Fakte, tamen, la tero fariĝis hereda posedaĵo de la nobelaro, de la eklezio kaj, parte, de la liberaj urboj kaj iliaj civitanoj. De la efektiva ekonomia kaj milita fortoj de ĉiu feŭdulo dependis lia persona povo ne nur en la kadro de la bieno, sed ankaŭ ekster ĝi. Tial ofte okazadis, ke unuopa granda nobelo fariĝadis eĉ pli grava kaj pli potenca ol la reĝo mem.

Oni klare vidas, ke en feŭdismo ne povis ekesti nacioj, nek formiĝi la koncepto mem pri nacio en la nuntempa senco de la vorto. La tuta strukturo de feŭdismo kontraŭstaris tion. La solaj du vastaj

ideoj, kiujn ĝi naskis, estis la ideo de Kristanismo, konkretiĝinta en la Papismo, kaj la ideo de la t.n. Sankta Romia Imperio, lanĉita kaj subtenata de la Imperiestro. La unua bazis siajn pretendojn kaj pravigis sian politikan aktivadon per la religia universaleco de Kristanismo, dum la dua akcentadis la neceson renovigi la iaman grandecon de la antikva Romia Imperio. Tiuj du universalismaj ideoj, tamen, ne eliradis el la kadroj de la tiam politika penso. Ili estis nur plua sekvo de tiu ordo funkcia pereo de personaj rilatoj de supereco kaj subeco. Ju pli firmiĝadis la feŭdaj ekonomiaj rilatoj, des malpli grandaj estis la ŝancoj realigi universalan efektivan politikan potencon. Tial ankaŭ la du ideoj fakte malsukcesis. La novaj, grandaj sociaj kaj politikaj unuiĝoj, kiuj ekestis en la sekvinta historia periodo, dankas sian estiĝon kaj sian vivkapablon al aliaj faktoroj kaj ne al la universalismo de Kristanismo aŭ de la Imperio.

La decida faktoro, al kiu estis ligitaj ĉiuj aliaj, estis la evoluo de la produktorimedo en la eŭropaj urboj. Kvankam la gravitpunkto de la ekonomia kaj socia vivo ankoraŭ longe restis la feŭda bieno, tamen en la urboj, meze de la naturala ekonomio, la perfektigado de la produktilaro ebligis la transiradon al novaj formoj de produktado, kaj la proprietuloj de tiuj potencaj produktorimedo — la burĝaro — fortikigis sian pozicion kaj formiĝis kiel nova socia klaso, samtempe nortanto de progresemaj ideoj. Transirinte al la maŝina, manufaktura kaj poste industria produktado, do al produktado por la nekonata aĉetonto, por la merkato, la portantoj de la novaj ekonomiaj fortoj estis interesitaj je kreo de ampleksaj ekonomiaj unuoj, en kies limoj ili senĝene, t.e. sen internaj doganaj kaj aliaj obstakloj, povos vendadi siajn varojn kaj kie ili samtempe estos protektataj kontraŭ la ekstera konkurenco.

Enkadre de tiu evoluo de la ekonomiaj fortoj la laboro ĉiam pli estis dividata, la mono ludis ĉiam pli gravan rolon kaj, kiel logika sekvo, la homoj ĉiam pli kaj pli venadis en staton de interdependeco sur multe pli vastaj teritorioj, ol estis la feŭdaj bienoj. Siavice tio kaŭzis evoluon de la komerco kaj necesigis la formiĝon de bankoj. Jam en la 12-a jc. preskaŭ la tuta komerco de Eŭropo estis en la manoj de la italaj urboj kaj precize en ili estis kreitaj la unuaj bankoj. La Banko de Venecio estis fondita jam en 1171 kaj funkciis ĝis la falo de la respubliko en 1797; la 76 bankistoj de Florenco en nuraj tri jaroj — inter 1430 kaj 1433 — donis pruntojn de ĉ. kvin milionoj da oraj florenoj; similajn monnegocojn faradis la Banko de San Giorgio en Genovo, la Banko de Amsterdam, fondita en 1609, kaj aliaj bankoj en la ekonomie florantaj eŭropaj urboj.

Cio-ĉi reflektiĝis en la socia vivo kaj en la renaskiĝo de la multfaceta eŭropa kul-

turo kiel daŭrigo, post miljara obskuro, de la greka-romia kultura heredaĵo. Oni komencis sentadi la apartenon ne plu sole al urbo aŭ bieno, sed al granda komunaro, la naskiĝanta nacio. Ŝimiliĝis multaj vivkutimoj, reviviĝis la realaj aŭ imagitaj komunaj tradicioj, kelkfoje eĉ fantaziaĵoj pri komuna deveno, ekĝermis ideoj pri egaleco de la homoj kaj amasiĝis la postuloj nuligi ĉiujn feŭdismajn privilegiojn. Tio fakte okazis: en iuj landoj pli frue, en aliaj pli poste. Tipa kaj la plej sanga ekzemplo estas la granda franca revolucio de 1789.

Necesas memori ke la monarkio, precipe en la komenco de tiu periodo, havis la plej bonajn aliancinojn en la burĝaro kiel klaso kaj en la urboj kiel politikaj unuoj. Gajaj klopodoj plilarĝigi kaj plifirmigi sian potencon super la feŭdaj grandaj nobeloj trovis apogon ĉe la t.n. tria klaso. Sed tiujn tendencojn krei grandajn unuecajn ŝtatojn helpis ankaŭ la malalta nobelaro, kiu atendis ke la monarkio protektos ĝin kontraŭ la grandnobeloj, kaj parte al la eklezio, kiu preferis ordon en forta monarkio, ol anarkian malordon en malforta. Rezulte kreiĝis la grandaj centralizitaj absolutismaj monarkioj kaj poste la grandaj unuecaj naciaj ŝtatoj.

Fine, la transpaso de feŭdismo al la nova ekonomia kaj socia ordo havis gravajn sekvojn ankaŭ koncerne la lingvon. Rapide malaperadis la latina, kies socia portanto estis la feŭda klaso, paralele kun la formortado de tiu socia tavolo kiel reganta klaso. Tiun sorton de la latina klare antaŭvidis unu el la plej grandaj humanistoj de sia tempo, la hispano J. L. Vives (1492-1540), en sia libro *De Disciplinis* (1532), en kiu li skribis: «Estus feliĉo, se ekzistus unusola lingvo, kiun povus uzi ĉiuj popoloj... Pereos la latina kaj tiam venos granda konfuzo en ĉiuj sciencoj, grava fremdiĝo inter la homa gento». Efektive, iom pli ol 100 jarojn poste, dum la Westfalia Kongreso (1648) la reprezentantoj de la eŭropaj ŝtatoj devis uzi siajn lingvojn, ĉar ili apenaŭ povis interkompreniĝi per la latina, kvankam ĝi plu estis skribe uzata por la diplomaciaj rilatoj.

Kiel malaperadis la latina, tiel formiĝadis la grandaj komunaj naciaj literatura lingvoj, kies celo estis servi kiel lingvaj komunikiloj de la formiĝantaj nacioj. Sialte ili fariĝis plia grava elemento en la fortikiĝo de la nacio kaj de la naciaj sentoj⁽²⁾.

Kiel oni vidas, multaj faktoroj kontribuis al la kreiĝo de tio, kion ni hodiaŭ nomas nacio. Ĝi estas socia-politika kategorio, ekestinta sur difinita ŝtupo de ekonomia kaj ideologia evoluo, kaj verŝajne malaperonta en la estonteco pro esence novaj materiaj kondiĉoj. Nuntempe ĝi estas realaĵo, rekonita eĉ en internacia juro. Nacio estas socia komunaro, kutime ligita per komunaj interesoj sur pli aŭ malpli vasta teritorio, aŭ almenaŭ kun te-

ritoria bazo, komuna norma lingvo, tradicioj, historio, vivmaniero, kelkfoje religio, politikaj aspiroj. Ĉiuj ĉi faktoroj aŭ nur kelkaj el ili, influante unu la alian, kune kontribuas al tiu psika stato, kiun karakterizas la sento pri aparteno al difinita nacio. Unufoje ekestinta, tiu koncepto povas esti transplantita ankaŭ en mediojn, kiuj ne posedas ĉiujn kondiĉojn por formiĝo de nacio, kaj tio fakte okazas.

La nova socia fakto trovis sian ideologian esprimon en naciismo. Ĝi rigardas la nacion kiel la fundamentan formon de ekonomia, socia, politika kaj kultura kunvivado de la homoj. Sekve, naciismo postulas, ke la nacio konserviĝu kiel suverena ŝtato, aŭ ke ĝi fariĝu tia, se ĝi ankoraŭ ne atingis ŝtatan organizformon. En kelkaj kazoj naciismo transformiĝis en imperialismon de la grandaj kontraŭ la ekzistoraĵoj de la malgrandaj. Tio, interalie, kaŭzis kaj plu minacas kaŭzi konkermitojn, unuflanke, kaj defendajn militojn, aliflanke.

La nuntempa politika kaj lingva situacio en Eŭropo ŝuldiĝas al la skizita historia evoluo⁽³⁾ kaj al novaj ekonomiaj fortoj, precipe al spektakla evoluo de teknologio, kiuj necesigas kaj novajn formojn de politika organiziĝo kaj racian solvon de la lingva problemoj.

3. Lingva kaj Politika Strukturo

Geografie Eŭropo etendiĝas de Uralo ĝis Atlantiko. Tio estas la tradicia kaj klasika Eŭropo de multfaceta komuna kulturo elkreskinta el la samaj radikoj de la greka-romia heredaĵo, kiun la renesanco kaj humanismo de la 14-a ĝis la 16-a jarcentoj riĉigis per novaj enhavo kaj formo. El lingva vidpunkto, rezulte de la prezerita evoluprocezo, ĝi estas Eŭropo de sesdeko ĝis sepdeko da kulturaj naciaj aŭ etnaj lingvoj kaj multnombraj dialektoj.

Por eviti konfuzon, estu tuj dirite, ke nacia lingvo estas komuna norma lingvo de plene formiĝinta nacio. La esprimo «etna lingvo» estas uzata en tiu ĉi kunteksto por indiki lingvon de relative malgranda aŭtonoma lingva kaj kultura komunaro sen propra nacia ŝtato kaj kutime ne pretendanta akiri plenan politikan sendependiĝon kaj kreon de tia ŝtato, sed nur kulturan aŭtonomion en la kadro de la nacie fremda ŝtato, ekzemple la kimra lingvo en Britio. Por lingva kaj kultura komunaro apartenanta laŭ ŝtataneco al nacie fremda ŝtato, sed laŭ nacieco, inkluzive lingvon, al samnacia alia ŝtato, estas preferinde uzi la terminojn «nacia minoritato», «minoritata nacia lingvo», k.s., ekzemple la hungara lingvo en Jugoslavio, aŭ la slovena en Aŭstrio, ktp.

La normaj naciaj kaj etnaj lingvoj estas fakte komunaj lingvoj super la multnombraj respektivaj dialektoj, slangoj.

lokaj kaj alispecaj parolformoj. Ne ekzistas konvenaj firmaj kriterioj por distingi lingvon disde dialekto kaj loka parolformo⁽⁴⁾. Unu el la diferencoj, vere grava almenaŭ el politika vidpunkto estas, ke la naciaj kaj etnaj lingvoj troviĝas unu apud la alia sur horizontala ebenajo, por tiel diri, dum la naciaj kaj etnaj lingvoj en rilato al la dialektoj kaj lokaj parolformoj troviĝas vertikale unuj super la aliaj. En marĝenaj kazoj eĉ tiu kriterio povas kelkfoje montriĝi nefidinda kaj havi gravajn politikajn konsekvencojn. Unu el la tipaj nuntempaj ekzemploj estas Makedonio kaj la makedona lingvo. Dum en Jugoslavio la makedona nacio kaj makedona lingvo estas rekonitaj eĉ konstitucie, la nuntempa oficiala bulgara politiko pretendas, ke ne ekzistas makedona nacio kaj ke la makedona lingvo estas nenio alia ol dialekto de la bulgara lingvo. El tiu ekzemplo klare vidiĝas, ke la distingo inter lingvo kaj dialekto ne estas nura lingvistika akademia demando, sed tre grava el politika vidpunkto.

La menciitaj 60-70 naciaj kaj etnaj normaj lingvoj — unu aŭtoro⁽⁵⁾ listigas kaj koncize prezentas precize 67 — estas parolataj en la sekvantaj 34 aŭ, se oni inkluzivas Andoron, 35 eŭropaj ŝtatoj:

Albanio, Andoro, Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Cipro, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germana DR, Germana FR, Granda Britio kaj Norda Irlando, Grekio, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Italio, Jugoslavio, Liĥtenŝtejno, Luksemburgio, Malto, Monako, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Rumanio, San Marino, Svedio, Svislando, Turkio, Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj kaj Vatikano. Du el la menciitaj ŝtatoj — Turkio kaj USSR — troviĝas nur parte en Eŭropo.

Lasante flanke por la momento la ekonomiajn-sociajn sistemojn kaj la politikajn reĝimojn en la eŭropaj ŝtatoj, la fundamenta kaj decida kaŭzo de ilia ekesto kaj ekzisto en la nuna formo en la grandega plimulto de kazoj estas la nacia principo, t.e. principo kiu nuntempe eĉ jure rekonas al ĉiu nacio la rajton konstituiĝi kiel sendependa ŝtato kun la propra nacia lingvo kiel la sola oficiala ŝtata lingvo. Pro la fakto, ke en Eŭropo ne ekzistas nete tranĉitaj teritoriaj limoj inter unu nacio kaj alia, sed en multaj regionoj miksite kunvivas apartenantoj de diversaj nacioj kaj etnoj, la nacia aŭ nacieca principo ne povis kaj neniam povos esti plene kaj strikte realigita. Tio kaŭzis kaj plu kaŭzos ĉiaspecajn politikajn tensiojn kaj aliajn problemojn, kiuj en la lastaj jaroj eĉ pli komplikiĝis pro la kultura kaj politika konsciigo kaj emancipiĝo de pliaj etnaj grupoj postulantaj aŭ aŭtonomion de diversaj gradoj en la koncernaj nacie fremdaj ŝtatoj, aŭ kompletan sendependiĝon, kiel ankaŭ pro la kreskanta migrado inter la eŭropaj ŝtatoj, precipe la okcidenteŭropaj.

La formigo kaj nuna ekzisto de kelkaj aliaj eŭropaj ŝtatoj — fakte nur la tute malgrandaj Andoro, Liĥtenŝtejno, Monako, San Marino kaj la iom pli granda Luksemburgo — suliĝas ne tiom al nacieca principo, kiom al aliaj faktoroj, ĉefe historiaj kaj ekonomiaj, dum Vatikano estas ŝtato de tute speciala karaktero, ekestinta surbaze de religiaj, historiaj kaj politikaj konsideroj. Ankaŭ la kvarlingva Svislando (Helvetia Konfederacio), fondita jam en 1291 per federigo de la svisaj kantonoj, estas iom aparta kazo, en kiu gravan rolon ludas ĝia geopolitika situo aldone al nacieca elemento kaj historiaj, ekonomiaj, religiaj kaj aliaj faktoroj.

La eŭropaj unuecaj ŝtatoj kun tre homogeno loĝantaro laŭ nacieco kaj gepatra lingvo estas tre malmultaj, fakte nur Irlando, Islando, Portugalio, Malto, Luksemburgo kaj la tre malgrandaj Andoro, Liĥtenŝtejno, San Marino kaj Vatikano.

Naciaj ŝtatoj — ĉu unuecaj, ĉu enhavantaj aŭtonomajn regionojn, ĉu federacie organizitaj — kun unu ĉefnacio kaj unu ĉeflingvo, sed kun naciaj aŭ etnaj minoritatoj kaj minoritataj lingvoj (kelkaj indikitaj parenteze) de proksimume ĝis 10 %-toj kompare kun la tuta loĝantaro, estas Albanio (greka, makedona, serba, rumana), Aŭstrio (slovena, kroata, ĉeĥa, hungara, k.a.), Danlando (germana, feroa, grenlanda), Germana DR (precipe luzica serba), Germana FR (dana, friza, k.a.), Finnlando (sveda, lapona, rusa, k.a.), Grekio (turka, albana, makedona, serba, hispana), Britio (kimra, skota-gaela, franca kaj aliaj, inkluzive tre multaj de la enmigrintoj en la lasta jardeko), Italio (germana, franca, slovena, kroata, greka, albana, kataluna), Nederlando (ĉefe friza), Norvegio (lapona), Pollando (ukrajna, rusa, belorusa, slovak, ĉeĥa, k.a.), Svedio (finna, lapona), Hungario (slovaka, serba, kroata, rumana, germana).

En pluraj eŭropaj unuecaj ŝtatoj kun unu ĉefnacio kaj unu oficiala nacia lingvo la nombro de apartenantoj al naciaj aŭ etnaj minoritatoj superas 10 %-tojn de la tuta loĝantaro. Ekzemple, en Bulgario la ĉefaj minoritataj lingvoj estas la makedona (kiel dirite, rigardata de la bulgaraj aŭtoritatoj nur kiel dialekto de la bulgara), la turka, rumana, greka kaj tatara; en Francio la okcitana, bretona, germana, itala, kataluna, vaska, nederlanda kaj flandra; en Hispanio la kataluna, galega-kelta kaj vaska; en Rumanio la hungara, germana, serba, rusa, ĉeĥa, slovak, greka, turka kaj tatara. Belgio nuntempe estas unika kazo de unueca monarkio dividita en tri lingvoteritorioj — la franca, flandra kaj germana — kaj la dulingva granda Bruselo kun egalrajteco de la franca kaj flandra.

La nacieca principo, kombinita kun la postulatoj de aŭtentikaj ekonomiaj bezonoj, historiaj aspiroj kaj sinceraj politikaj konsideroj, aŭ sole kiel necesa for-

mala koncedo fare de la reganta nacio (la t.n. «pli aĝa frato»), esprimiĝis en la federacia strukturo de la plurnaciaj-plurlingvaj eŭropaj federitaj ŝtatoj. La Svisa Konfederacio kaj, nuntempe, la Jugoslavia Federacio estas la du landoj, en kiuj ne nur la ĉefaj naciaj lingvoj, sed ankaŭ la lingvoj de la naciaj kaj etnaj minoritatoj estas konstitucie garantiitaj kaj respektataj en la praktiko. En Svislando la oficialaj lingvoj estas la germana-svisa, la franca-svisa, la itala-svisa kaj la retoromana. En Jugoslavio la oficialaj lingvoj de la federacio kaj de la 6 konstituaj respublikoj estas la slovena, kroata, serba, makedona, kaj en la aŭtonomaj provincoj Vojvodino kaj Kosovo en la kadro de Serbio egalrajtecon ĝuas la hungara kaj albana. Ankaŭ la multnombraj lingvoj de la naciaj minoritatoj kaj etnaj grupoj — la itala, germana, slovaka, ĉeĥa, bulgara, rumana, turka, cigana, k.a. — ĝuas juran kaj faktan protekton. En Ĉeĥoslovakio, nun formale organizita kiel federacio, la du ĉefaj lingvoj estas la ĉeĥa kaj slovaka, dum la plej gravaj minoritataj lingvoj estas la hungara kaj la germana.

USSR estas tute aparta kazo de formala koncedado al la nacia-nacieca principo kun samtempa fakta superregado de la rusa nacio, kutime nomata «la pli aĝa frato», kaj de la rusa lingvo, ofte laŭdata kiel «la lingvo de la granda rusa popolo» kaj «la lingvo de socialismo», k.s. En 1917, antaŭ la Oktobra Revolucio, sur la teritorio de Imperia Ruslando troviĝis ĉ. 200 nacioj kaj etnoj kun siaj propraj lingvoj. Dank' al la procezo de kunfandiĝo, en kiu la pli fortaj nacioj kaj lingvoj englutis la malpli fortajn, kaj al la konscia politiko de rusigo, la nombro de nacioj, «naciecoj» (malpli grandaj nacioj) kaj etnaj grupoj migrandiĝis al ĉ. 100 nuntempe. La federa organizo de Soveta Unio nur parte reflektas tiun laŭnaciecan strukturon, ĉar ne ĉiuj naciecoj kaj etnaj grupoj ricevis aŭtonomion.

USSR nun konsistas el 15 uniaj respublikoj, konstitucie rekonitaj kiel suverenaj ŝtatoj de la 15 ĉefaj nacioj, kiuj, krome, havas limojn kun aliaj ŝtatoj aŭ kun la maro pro la formale rekonita rajto ekŝiĝi el la Unio⁽⁶⁾. Siavice, RSFSR estas federacie organizita en la kadro de la Unio. Kvin el la uniaj respublikoj (Estonio, Litovio, Letonio, Moldavio kaj Armenio) estas rigardataj kiel ununaciaj, sen konsiderindaj naciaj minoritatoj. En la ceteraj dek, aldone al la ĉefnacioj, troviĝas «naciecoj», naciaj kaj etnaj grupoj, kiuj, depende de la grandeco, graveco kaj aliaj faktoroj, havas siajn aŭtonomajn respublikojn, aŭtonomajn regionojn aŭ aŭtonomajn distriktojn kun la rajto uzi siajn proprajn lingvojn kaj kun difinitaj aliaj kulturaj rajtoj. Nur en RSFSR troviĝas 16 aŭtonomaj respublikoj, 5 aŭtonomaj regionoj kaj 10 aŭtonomaj distriktoj.

Ĉiuj multnombraj naciaj lingvoj de la uniaj respublikoj kaj de la diversgradaj

aŭtonomaj unuoj en la kadroj de la uniaj respublikoj estas oficiale rekonitaj. En la eŭropa parto de Soveta Unio la ĉefaj el ili estas la rusa, ukraina, belorusa, estona, litova, letona, moldavia. Necesas aldoni, ke en tiu eŭropa parto vivas ankaŭ apartenantoj de pluraj aliaj nacioj, ne troviĝantaj en la prezentita strukturo: poloj, bulgaroj, grekoj, hungaroj, rumanoj, finnoj, turkoj, ĉeĥenoj, slovako k.a., ĉiuj kun siaj propraj lingvoj.

Super la lingvoj de ĉiuj nacioj, «naciecoj», etnaj grupoj kaj naciaj minoritatoj troviĝas la rusa lingvo, devige instruata en ĉiuj lernejoj kaj vaste uzata kiel la sola lingvo de komunikado sur la tuta teritorio de Soveta Unio.

Cio ĝis nun dirita rilatas nur al la naciaj kaj etnaj lingvoj kiel gepatraj aŭ familiaj en la diversaj eŭropaj ŝtatoj. Ne eblas prezenti detalojn, sed utilas almenaŭ menci, ke en multaj regionoj la loĝantaro estas denaske dulingva, nome akiras ekde la infanaĝo kaj la propran nacian aŭ etnan lingvon kaj la oficialan nacian lingvon de la ŝtato. Troveblas ankaŭ kazoj de trilingvismo (ekz. en AP Kosovo ofte la turka, albana kaj serba). Krome, en ĉiuj eŭropaj ŝtatoj nombro da personoj — relative ege malgranda kompare kun la tuta loĝantaro kaj kun la enormaj fortostreĉoj — pli aŭ malpli bone scias unu, du aŭ eĉ kelkajn fremdajn naciajn lingvojn.

La tuta komplikita kaj plu komplikiĝanta lingva situacio en Eŭropo, fidele reflektanta la dezirojn kaj rajtojn de ĉiu nacio aŭ etno konservi sian identecon, speguliĝas, interalie, en la eŭropaj interŝtataj organizaĵoj kaj instancoj. Ĉar tiu demando estas analizita en la pasintjara prelego, poste publikigita en *Internacia Jura Revuo*⁽⁷⁾, ĉi tie estu menciitaj nur laŭnome la vere plej gravaj el ili kaj iliaj respektivaj oficialaj lingvoj.

En Okcidenta Eŭropo funkcias granda nombro da interŝtataj organizaĵoj, inter kiuj elstaras la jenaj tri:

Eŭropa Konsilantaro (EK) kun sidejo en Strasburgo, fondita en 1949, nun konsistanta el 20 Ŝtatoj-Membroj. Ĝiaj oficialaj lingvoj estas la franca kaj angla, sed ĉiuj aliaj lingvoj de la membroj estas permesitaj sub la kondiĉo, ke la koncernaj delegacioj mem prizorgu la tradukon en unu el la oficialaj. Fakte, precipe la germana kaj itala estas multe uzataj.

Eŭropaj Ekonomiaj Komunaj (EEK) kun sidejoj en Bruselo kaj Luksemburgo, kunfandiĝintaj en 1965, nun konsistantaj el 9 Ŝtatoj-Membroj. La 6 lingvoj de la membroj, t.e. la angla, dana, franca, itala kaj nederlanda estas oficialaj kaj egalrajtaj; aldone la irlanda estas oficiala por la plej gravaj dokumentoj.

Organizaĵo de la Nordatlantika Traktato (ONAT) kun sidejo en Bruselo, fon-

dita en 1949, konsistanta el 15 Ŝtatoj-Membroj, el kiuj 13 en Eŭropo plus Usono kaj Kanado. La oficialaj lingvoj estas la angla kaj franca.

En Orienta Eŭropo funkcias precize 30 interŝtataj organizaĵoj de la soveta bloko. La du plej gravaj estas:

Konsilantaro por Ekonomia Reciproka Asisto (KERA) kun sidejo en Moskvo, fondita en 1949, konsistanta el 10 Ŝtatoj-Membroj kun Albanio, Kubo, Mongolio kaj Vjetnamo (ekde junio 1978), sed Albanio ne partoprenas ekde 1961. Malgraŭ la membreco de Kubo, Mongolio kaj nun ankaŭ Vjetnamo, ĝi estas esence eŭropa organizaĵo. Formale, ĉiuj lingvoj de la membroj, t.e. 7 eŭropaj, estas oficialaj, sed fakte la rusa estas la sola kaj oficiala kaj labora lingvo.

Organizaĵo de la Varsovia Traktato (OVT-o) kun sidejo en Moskvo, fondita en 1955, konsistanta el 8 Ŝtatoj-Membroj de la soveta bloko en Eŭropo, sed en 1968 Albanio formale ekis. Ankaŭ en tiu organizaĵo la rusa estas fakte la sola oficiala kaj labora lingvo.

Laste estu menciita la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo de la 1-a de aŭgusto 1975, pli konata kiel la Fina Akto de Helsinki. Kvankam ĝi ne estas jure deviga traktato, tamen ĝi estas unuaranga politika dokumento, kiun subskribis ĉiuj supre menciitaj eŭropaj ŝtatoj kun la escepto de Albanio (rifuzinta la inviton) kaj Andoro (ne invitita) plus Usono kaj Kanado, do entute 35 ŝtatoj⁽⁶⁾. La Fina Akto estas verkita en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj rusa, ĉiuj tekstoj egale aŭtentikaj.

Tiel prezentigas la politika kaj lingva mapo de Eŭropo. La lingvodiverseco estas unu el la plej gravaj obstakloj al efika funkciado de ĉiuj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj, al kunlaborado sur ĉiuj niveloj, al simpla interkompreniĝo en la kadro de la daŭre kreskantaj amasaj kontaktoj de la ordinara eŭropanoj.

4. Esperanto kaj ĝia Ebla Rolo

La lingva problemo en Eŭropo estas parto de la ĝenerala problemo de lingva komunikado en la mondo, sed ĝi sentiĝas aparte akute ĝuste sur nia kontinento. En Eŭropo — kaj aliloke — ĝia kvintesenco konsistas en la konflikto inter du kontraŭaj tendencoj: tiu direktita al konservo de la propra nacia etna identeco kaj tial celanta aŭtonomion aŭ eĉ sendependiĝon, unuflanke, kaj tiu puŝanta al integriĝo de diversaj fortogradoj pro la spektakla teknologia progreso, kaŭzanta amasan produktadon, plian ekonomian interdependecon kaj dividon de la laboro, aliflanke. La problemo estas kompleksa kaj manifestiĝas en diversaj sociologiaj, politikaj, juraj, psikologiaj, teknike lingvaj

kaj aliaj aspektoj, ne laste la ekonomia⁽⁷⁾. Ĉio ĉi estas abunde pritraktita en la dokumentoj de CED antaŭ 1974 kaj resumita en la enkonduke menciita Memorando kaj Agadprogramo. Ankaŭ la pledo por la solvo de la lingva problemo per la neŭtrale homa Internacia Lingvo kiel sintezo inter la du ĵus menciitaj kontraŭaj tendencoj, estas same abunde dokumentita kaj argumentita.

Restas ekzameni mallonge la ŝancojn de Esperanto en la nuna eŭropa realaĵo. La elirpunkton formas du fundamentaj tezoj. La unua baziĝas sur la fakto, jam pritraktita, ke la tuta problemaro kaŭzita de la lingvodiverseco en Eŭropo urĝe postulas radikalan solvon por kontentigi la kreskantajn bezonojn de internacia komunikado sur ĉiuj niveloj. La dua baziĝas sur la fakto, nekontestebla por ĉiuj sciantoj de Esperanto, ke la Internacia Lingvo estas tiel evoluinta, ke ĝi jam nun kontentigas la bezonojn de la parolantoj kaj ke, pro sia interna strukturo, ĝi posedas senlimajn potencialojn por plua leksika riĉiĝo kun samtempa strikta observado de la Fundamento por konstante adaptiĝi al la daŭre aperantaj novaj bezonoj, precipe en la sfero de ĉiuj sciencaj branĉoj. El la diversaj teoriaj eblecoj, ofte pure abstraktaj kaj neglektantaj ĉiujn aŭ kelkajn el la decide gravaj aspektoj de la problemaro, kiel ankaŭ la postulatojn por efika kaj ĉiufanka lingva komunikilo, la ĝenerala adopto de Esperanto tial prezentiĝas kiel la sola racia kaj praktika solvo.

Necesas, do, kunligi la bezonojn kun la rimedo kontentiganta ilin. Tio signifas, ke nepras intensigi la laboron por disponigi Esperanton kiel socie enradikiĝintan kaj plene funkciantan lingvon kun ĉiuj kulturaj valoroj kreitaj en ĝi aŭ pere de ĝi, kaj ne perdadi la tempon kaj fortojn por sterilaj diskutoj kun mortnaskitaj lingvoprojektoj, kio, krome, nur kreas konfuzon, bremsas la progreson kaj eĉ povas por ĉiam haltigi la solvon. Tia pozitiva agado, firme kaj konscie praktikata en UEA, dum pli ol kvaronjarcento senpere antaŭ la eventoj de Hamburgo en 1974, implicas paralelan forigon de ĉio sekteca kaj sufokon de primitivaĵoj, kiuj en diversaj periodoj en la historio de la Esperanto-Movado, inkluzive la posthamburgan periodon en UEA, kaŭzis kulturalan kompromitiĝon de la esperantismo kaj tial obstaklis kaj plu obstaklas la progreson en la direkto al la solvo. Oni devas fine kompreni, ke nur kulture prestiĝa kaj respektata Esperanto-Movado povas sukcese progresigadi la Internacian Lingvon kiel elementon de la nuntempa kulturo kaj konsistan parton de la estonta. Male, primitivaĵoj kaj sektaĵoj retrofalas ne nur sur la kapojn de la fuŝuloj kaj sur la organizaĵojn, en kies nomoj ili parolas, sed bedaŭrinde makulas la tutan Esperanto-Movadon kaj eĉ la lingvon mem. Oni memoru unufoje por ĉiam, ke ne eblas agadi por kultura afero per nekulturaj metodoj.

La konkretaj taskoj, konformaj al tiuj pensoj en la kadro de la du fundamentaj tezoj, estas formulitaj en kvin kunligitaj punktoj, ĉiu kun pluraj eroj, de la Memorando kaj Agadprogramo: sciencaj esploroj kaj informado, praktikaj servoj kaj simpativarbado, faka interkompreniĝo trans la lingvaj limoj, klerigo kaj edukado, eŭropa kulturpolitiko. Pro siaj strukturo kaj konsisto, Eŭropa Klubo, eventuale kun la aktiva helpo aŭ almenaŭ apogo de kompetentaj Esperantaj kaj aliaj instancoj en la eŭropaj landoj, estas nuntempe la plej taŭga organizajo por realigi la programon. Se ĝi paralele aktivos en la kvin direktoj kaj se, aldone, ĝi studos la historion de Esperanto-agadoj en Eŭropo ekde la fruaj kvindekaj jaroj ĝis 1974 kaj konsideros la nunan staton⁽¹⁰⁾ por adekvate utiligi la pozitivajn spertojn kaj eviti la negativajn, oni povas atendi kun granda versaĵo, ke ĝi sukcesos iom post iom enkonduki en Eŭropo realecan dulingvismon: nacia lingvo por komunikado interne de la nacio, Esperanto kiel la lingvo de internacia komunikado.

Kompreneble, en la nuntempa Eŭropo, politike dividita, la agado de la Klubo provizore devos esti limigita al Okcidenta Eŭropo, unuavice al EEK, sed nenio malhelpas formi similan organizaĵon kun similaj celoj en Orienta Eŭropo.

5. Konkludo

Estas absolute malĝusta la opinio, enradikiĝinta en difinitaj Esperanto-medioj, ke la t.n. «eksteraj cirkonstancoj» malfavoras pli grandskalan disvastigadon de Esperanto, aŭ kaŭzas stagnon, aŭ eĉ regreson. Tion kutime asertas pasivuloj aŭ

personoj, kiuj al aliaj kaj al si mem tiamaniere pravigas siajn proprajn malsukcesojn, fakte kaŭzitajn de la propraj eraroj kaj misagoj. Same malĝusta estas la negativa opinio ekster la Esperanto-Movado, ŝuldata almenaŭ parte al la samaj eraroj kaj misagoj, ke «Esperanto ne taŭgas». La vero estas, ke neniam antaŭe la objektivaj kondiĉoj estis pli maturaj, ol ili estas ĝuste nun, precipe sur nia dense loĝata kontinento kun sepdeko da kulturaj lingvoj, sennombraj dialektoj kaj 35 ŝtatoj. Tio precipe validas por Okcidenta Eŭropo pro la aktuala procezo de integriĝado en egalrajteco kaj pro la perspektivoj de eĉ pli amasaj liberaj fluoj de ideoj kaj personoj, inkluzive migradojn, en la proksima estonteco. Fine, neniam forgesante, ke Esperanto ne estas nur eŭropa, sed monde internacia kaj neŭtrale homa lingvo, la vero tamen estas, ke en neniu mondoparto la Internacia Lingvo estas tiel disvastiĝinta kaj tiel forte socie enradikiĝinta, kiel en Eŭropo. Tio siavice konsiderinde faciligas la agadon kaj la plenumon de la tasko ĝuste en Eŭropo.

Sukcesa etapa solvado de la lingva problemo laŭ la baza principo de dulingvismo eĉ nur en unu parto de la tradicia Eŭropo, ekzemple kaj unuavice en EEK, sendube servus kiel imitinda modelo en la aliaj partoj kaj povus baldaŭ etendiĝi al la tuta mondo. Sed ni bone konsciuj, ke la eŭropa socio rapidege evoluas. La tempo flugas. Necesas agi tuj, laŭplane kaj celtrafe. Alie tiuj ĉi unike favoraj kondiĉoj ne estos ekspluatitaj kaj la bonega ŝanco kaj por Eŭropo kaj por Esperanto kaj por la mondo estos perdita. Eble por ĉiam, ĉar la historio ne kutimas ripetiĝi.

Piednotoj

- (1) *Horizonto*, n-ro 12/77, p-oj 122-127. En la titolo estas ellasita la vorto «memorando», sed laŭhave ĝi estas Memorando kaj Perspektiva Agadprogramo.
- (2) La formiĝo de kelkaj komunaj lingvoj, inkluzive Esperanton, estas sufiĉe detale, pritraktita en ĉap. V kaj VI de *Retoriko*, tria eldono, Rotterdamo, 1971, p-oj 91-116.
- (3) En la verko de la preleganto *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, Rotterdamo, 1952, troviĝas pliaj analizoj kaj eksplikoj pri la formiĝo de nacioj kaj naciaj ŝtatoj, federalismo kaj pluraj konektitaj demandoj.
- (4) V. pri tio en *Retoriko*, precipe p-oj 24-25, 76-77, 94-96, 104-105, 107, 109 kaj en la verkoj cititaj en la respektivaj piednotoj.
- (5) Harald Haarmann, *Soziologie und Politik der Sprachen Europas* (Sociologio kaj Politiko de la Lingvoj de Eŭropo), München, 1975. Pluraj informoj pri la lingva strukturo de unuopaj eŭropaj ŝtatoj estas prenita el tiu ĉi verko, tiurilate tre bona kaj fidinda, siavice bazita sur la verko de S. I. Bruk kaj V. S. Apenĉenko, *Atlas Narodov Mira* (Atlaso pri la Popoloj de la Mondo), Moskvo, 1964.
- (6) La suvereneco de la uniaj respublikoj kaj ilia rajto ekzisti el la Unio estas pure formalaj, ĉar la tutunia kriminala leĝo kaj la kriminalaj kodoj de la uniaj respublikoj difinas ĉiun agadon direktitan al la realigo de tiuj konstitucie garantiitaj rajtoj kiel krimon de perfido, por

kiu estas preskribitaj la plej severaj punoj, inkluzive la mortpunon. Similaj kontraŭdiroj inter la Konstitucio, la leĝo kaj la realaĵo estas troveblaj ĉie en la soveta jura sistemo.

- (7) I. Lapenna, «Kelkaj Juraj Aspektoj de la Multlingveco en EEK», *Internacia Jura Revuo*, n-ro 2/77, p-oj 11-17.
- (8) V. pri tio en I. Lapenna, «Jura Valoro de la Fina Akto de Helsinko», *Internacia Jura Revuo*, n-ro 1/77, p-oj 19-30.
- (9) En 1975 nur en EEK laboris 1450 interpretistoj kaj tradukistoj. Laŭ la londona *The Times* de 07.12.76, la tradukaj servoj okupis 38 % de la tuta oficistaro kaj en 1976 la kosto estis 12.500.000 anglaj pundoj. Laŭ Roy Jenkins, la nuna prezidanto de la Komisiono de EEK, la nombro de geoficistoj nur en la Komisiono superis 10.500 en 1977, el kio 30 % estis tradukistoj kaj interpretistoj (European Community, Marto 1978, p. 5). Similajn elspezojn pro multlingveco havas la aliaj organizaĵoj. Se oni aldonas la kostojn de multlingveco en komerco, turismo, por lernado de fremdaj lingvoj ktp., la financa ŝarĝo de multlingveco atingas miliardajn ciferojn en pundoj. Kaj tion devas finfine pagi ni mem, la eŭropaj civitanoj.
- (10) Pri la multnombraj agadoj en Eŭropo ekde 1954 ĝis 1974 v. la koncernajn partojn en la Estraraj Raportoj, publikigitaj ĉiujare en la *Jarlibro, Dna Parto*, 1954-1974. Pri la nuna stato, laŭ informoj de UEA, v. la Raporton de la Estraro en *Esperanto*, n-ro 6/78, p. 115, el kiu tamen ne vidiĝas kio fakte estas farita kaj kun kiaj rezultoj.

En HEROLDO (1 septembro 1978) post ditirambaj vortoj pri «La dua plej granda kongreso» en Varna sekvas sur la 6-a pago riproĉegoj pri la materiala organizo de la kongreso: «...En la lando kun la plej multnombra Movado mankis dejorantoj ĉe la ĝiĉetoj, pluraj el kiuj malbone funkciis; pro malsufiĉo de organiza antaŭvido la poŝt-kaj mesaĝ-disdonado ĉe la rendevua tabulo estis kaosa. La organizo de la ekskursoj (pagoj kaj enmanigo de la biletoj) kaj de la loĝado atingis la supron de la fuŝo; tio des pli mirigas, ĉar ambaŭ servoj troviĝis en la manoj de la oficiala vojaĝagentejo Balkanturist. (Kial mirinde?) Samaj ĉambroj estis luitaj plurfoje al diversaj personoj, frupagintoj ne ricevis loĝejon, fruaj pagoj ne estis registritaj... Plendoj alfluis pocentaj: grupo da junuloj, kiu trovis siajn rezervitajn ĉambrojn okupitaj, konteste kaj manifestacie sidis surplanke en la ĉefsalono antaŭ la Inaŭguro. Al la nekompetenteco de la oficistoj (aŭ de la respondeculoj de la loĝistiko) aldoniĝis la lingvaj baroj, ĉar la reprezentantoj de Balkanturist ne konis Esperanton kaj neniu interpretisto dejoris ĉe ilia flanko. Kaj tio jam estas skandalo... Ankaŭ la Gazetara Servo ne sukcesis funkcii akurate malgraŭ la libervola helpo de eksterlandaj spertaj kongresanoj. Tiu duonfuŝo jam de kelkaj jaroj fariĝis tradicia... La uzado de fremdaj lingvoj, la fuŝoj en loĝado kaj ekskursoj, la malfruigoj de la Gazetara Servo, la manko de restoraciaj servoj, la kaosoj, la marasmoj devas definitive ĉesi...» Nu, kiu respondecas en la Estraro de UEA pri la kongreso? Unuavice, la respondeculino pri kongresoj kaj krome la prezidanto.

Dume H. Tonkin, kiu eĉ ne unu vorton diris pri la «Manifesto-77» kaj ĝin ne prezentis al la Komitato en Rejkjavik, paroladis interalie: «Antaŭ 30 jaroj estis subskribita la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: ĝi fariĝis unu el la bazaj gvidaj dokumentoj por la laboro de UEA». Oni povas demandi sin, ĉu la Deklaracio estas aplikita de UEA aŭ nura «dokumento», alidire: «vortoj, vortoj, vortoj!» laŭ Hamleto!

La tuta trimonata revuo de TEJO, KONTAKTO (n.º 57) estas dediĉita al «malarmado». «De armado tra armata ŝtato al terorismo. Pri tio verkis por ni Guido Brandenburg. Skribas ĉekape unu el la redaktoroj, Stefan Mac Gill. De terorismo tra enŝtataj disputoj al lingvopolitiko. Pri tio amplekse verkis Renato Corsetti.» Jen kiel prezentigas la oficiala organo de la junulara branĉo de UEA! Unu el la artikoloj sub la titolo «Mortigiloj por ĉiuj» kaj sub la plumo de Jim Cushing pritraktas la limigon de la armilkomercado sed precipe en la kadro de la Okcidenta Mondo! Ankoraŭfoje ne temas pri la demando, ĉu por aŭ kontraŭ la milito: ja ĉiuj homoj ĝenerale estas kontraŭ. Sed la neŭtrala punkto estas, ĉu por unu aŭ alia partio en la konkurado?

Tiam ĉu mirinde, se en l'esperanto (n.º 4-5, 1978), la revuo de itala esperanto-federacio, oni povas ekscii el intervjuo de la prezidanto de TEJO fare de Bruĉjo Kasini: «...Vi duavice menciis la revuon 'Kontakto'; en via novjara saluto jam vi promesis al ĝiaj abonantoj kaj al la membroj de via organizo reĝisdatigon de ĝiaj aperdatoj. Nun tamen, UEA draste bremsis tiun vian projekton per cenzuro de la materialo de unu tuta numero, kio signifas, ke dumonata laboro de la personoj, kiuj interesiĝas pri 'Kontakto', tute perdiĝis por TEJO, malgraŭ ke tiu materialo aperos tamen aliloke. Ĉu tamen, malgraŭ tiuj malfacilaĵoj starigitaj de la Centra Oficejo de UEA, TEJO ankoraŭ supozas sukcesi en la restarigo de la ĝusta aperritmo de sia revuo pli frue ol la fino de tiu ĉi jaro?». Senkomente! Aliflanke en la sama numero estas bonega artikolo de Vittorio Dall'Acqua pri la ortografio de la propraj nomoj responde al la asertoj de Renato Corsetti.

Fine el STARTO (n.º 3, 1978) jen novaĵo: Laŭ la informo de profesoro Magomet Isaev el Moskvo la ŝtataj aŭtoritatoj aprobis starigon de la esperantista organizaĵo en Sovetio. Nuntempe oni prilaboras la regularon de la nova asocio, kiu agados enkadre de la supera kultura institucio — Ligo de amikecaj societoj. La alia decido rilatas eldonon de centra gazeto por la sovetaj esperantistoj. He! Oni povas demandi sin, kial tia asocio kaj tia gazeto ne estis fonditaj pli frue!

J. T.

DONACOJ POR «HORIZONTO» — 1978

Gisnuna sumo	6.541 ptoj.
Maria Casasnovas, Zaragoza (Hispanujo)	500 »
Amparo Cano, Zaragoza (Hispanujo) ...	500 »
Maurice Henry, Triel-sur-Seine (Francujo)	500 »
André Blondeaux, Loctudy (Francujo) ...	250 »
Partoprenantoj de la IV.ª Konferenco de NEM	73.954 »
	82.245 »

POSTKONFERENCA EKSKURSO



Kiel postkonferenca ekskurso, (la Konferenco fermiĝis tagmeze), la 29-an posttagmezo okazis la ekskurso al Hecho-Siresa-Oza. En 1970 mi vizitis unuafoje la valojn de Hecho, kaj Oza; tiam mi promesis reveni, sed bedaŭrinde, ĉifoje, ni ne multe povis ĝui la belecon de Oza, kaj la gastamecon de la «chesos», la ekskurso estis nur duontaga. Verŝajne, pro tio ĝi estis organizita vizitante unue Oza, kaj revene la vilaĝon Hecho.

Survoje al Oza, ni haltis en Siresa, por admiri la Monaĥejon dediĉitan al Sankta Petro, de visigota tradicio. Laŭ malnova onidiro, ĝia fasado havas tiom da anguloj kiom da tagoj havas unu jaro.

Fine ni alvenis al Oza, kiu sendube estas unu el la plej belaj valoj de la Pirenea montaro, ĉirkaŭita de altegaj montoj, kun densa arbaro el gigantaj abioj kaj fagoj kiuj grimpas sur la deklivoj de la montoj... Dum mia unua vizito, mi aŭdis paroli emfaze pri «Peña Forca», «Acher», «Visaurin», la «Circo de la Mistresa»... Dum tiuj jaroj mi plurfoje deziris reveni, nun mi povis konstati ke kiuj tiel parolis pri Oza ne troigis, kaj mi promesas ke antaŭ nelonge mi revenos por trankvile viziti tiun belan valon. Revenante al Hecho, ni haltis por admiri «La boca del Infierno», mirigan krutajon ne facile priskribebla.

En Hecho, vilaĝo kiu donas nomon al la valo, ni ankaŭ vizitis la prahejmon de familio Gastón. Emilia deziris akcepti nin en ĝi, kiel elmonro de amikeco, kaj Inés deziris ke ni gustumu la plej bonan vinon el la mondo en sia vinkelo.

Entute, la ekskurso estis kora fino, por tiel sukcesa Konferenco.

EL LA DANA AGADGRUPO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO SIN LEVIS NOVA VOĈO, LA BULTENO: "PERSPEKTIVO"

Jam du numeroj aperis, tiu de aŭgusto kaj tiu de septembro 1978. Ni ĝojas saluti la aperon de frat-gazeto sur la batalkampoj por la partipolitika neŭtraleco. Kelkaj artikolaj titoloj el la aperintaj numeroj: — «*Pri la Ligo*», surbaze de ekstrakto de d-ro L. L. Zamenhof ĉefartikolo de Rie Krainer, la redaktorino — Pozicio de la bulteno rilate al «*HORIZONTO*», de Peter Zacho — «*Ora jubileo de Ivo Lapenna*», artikolo de H. V. Rasmussen — «*Kvazaŭna recenzo de tabua libro*» de H. V. Rasmussen — «*Kial?*» de P. Z. — «*Deklaro de principoj de la 1-a I.K. de la N.E.M.*» — «*Impresoj de Jaca*» de Rie Krainer — «*Nefermita letero al la D.E.A.-prezidantino*» de H. V. Rasmussen — «*Voĉo de la dana agadgrupo*» de P. Z. — «*Ventegoj kaj ondaroj...*» de Leopoldo Karol — «*Brila, altnivela konferenco en Jaca*» de Birthe Zacho.

Gratulon al la danaj geamikoj! La bulteno ok-paĝa aperas ĉiumonate (por 10 numeroj en la jaro la abono estas 35 d.kr.). Por la lasta duonjaro 1978, 15 d. kr.

J. T.

MARILIA, ĈEFURBO DE ESPERANTO EN SUD-AMERIKO

Marilia, la urbo kien ĉijare okazis, kun granda sukceso, la *1-a Latin-Amerika Esperanto-Kongreso*.

En 1979 Marilia festos la 50-jaran jubileon de sia fondiĝo, okazinta la 4-an de aprilo 1929. Je tiu okazo, en la kadro de la jubileaj festoj de la urbo, okazos en Marilia la *1-a Internacia Simpozio de Esperantistaj Sciencistoj*. La Simpozio okazos de la 12-a ĝis la 16-a de aprilo 1979, en la moderna salono de la Regiona Medicina Sidejo.

Tre interesa informo broŝuro parolas nin, koncize, sed klare, pri tiu urbo kies simbolo estas: AMO KAJ LIBERECO.

En la persono de ĝia Urbestro, ni gratulas la urbon pro ĝia Ora Jubileo, kaj deziras al niaj brazilaj samideanoj, plej grandan sukceson por la *1-a Internacia Simpozio de Esperantistaj Sciencistoj* okazonta en Marilia.

I. G.

Informoj pri la Simpozio donas: Prof. Wilson Ferreira Martins, Caixa Postal 556 17.500 - MARILIA (SP) Brazilo.

LA KAPROMPA ANGULO

Unu el la ĉarmoj de la etnaj lingvoj kuŝas en tiuj longtradiciaj esprimoj, kiuj konsistigas sonagrablajn formulojn plej ofte malfacile tradukeblajn de unu lingvo al la alia.

Ankaŭ la Lingvo Internacia posedas tiajn dirojn: d-ro L. L. Zamenhof dotis ĝin per oreľfrapaj kaj koncizaj esprimoj kiel ekzemple «*Ce l'freŝa ĵaro*», «*Aŭ festo aŭ fasto*», ktp.

Ilin karakterizas precipe sonaj kvalitoj, ritmo, aliteracio, asonanco, eventuale rimigo; sed ankaŭ konkretaj bildoj aŭ beletraj aludoj. Ĉu vi bonvolas ludi per tia cerbuma transerĉado (en la literaturo) de plej taŭga ekvivalento, aŭ per originalaj proponoj?

Jen komencintence la franca dirmaniero «*A bâtons rompus*», laŭvorte: kun rompitaĵ bastonoj. Plej ofte koncerne al konversacio iel diverstema kaj sensekva ĝi estas uzata kiel adverbo kun la ĝenerala signifo: *senkontinue, kun interrompoj, intermite*. En la germana oni povus diri: *ohne Zusammenhang*; kaj en la angla: *by fits and starts*; en Esperanto kion? Ĉu «*fadenŝire babili*»? Jam oni povas «*perdi la fadenon en la parolo*» (d-ro L. L. Z.)! Eventualaj interesuloj, sendu viajn solvojn al Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75 017 Parizo.

18 - aĵ INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1978 - a

VERDIKTO

NATURA FLORO:

1.^a Subpremio:

2.^a Subpremio:

JASMENO:

VIOLO:

1.^a Subpremio:

ORIGINALA PROZO:

1.^a Subpremio:

2.^a Subpremio:

«El taglibro por Kristina», de Kris LONG, el Britujo.

«Tenera saŭdado», de Reto Rossetti, el Alglujo.

«Marborde», de Zora HEIDE, el Danlando.

«Stranga sonĝo», de Simeon M. SIMEONOV, el Bulgarujo.

«Rita», de Lina GABRIELLI, el Italujo.

«Ĉi nokte», de J. BALBIN, el Usono.

«Memoraĵo el Pompejo», de Bernad GOLDEN, el Hungarujo.

«Onia meditado», de Giordano MOYA, el Hispanujo.

«Luna nokto», de Oldřich KNICHAL, el Ĉeĥoslovakujo.

Subskribis la verdiktan akton:

Manuel CASANOVES, CMF, Prezidanto; Salvador GUMA, R. Fernández Jurado, Juan

Vélez; G. MORA i ARANA, Sekretario.

Tortosa (Hispanujo), la 1-an de oktobro 1978-a.